

Ŝi pensis, ke tiu geedziĝo, pli ol iu alia, estos aventuro. Ne estis tiel, ke la viro havis laŭvorte magian fascino al ŝi. Li estis malgranda, nervema, malrekta, dudek jarojn pli aĝa, kun brunaj okuloj kaj grizaj haroj, orfo, veninta al Ameriko el Holando, plurajn jarojn pli frue, kiam li ankoraŭ estis knabeto. **Uzino 3**



## **UZINO 3**

*Legolibro kun originala*

*kaj tradukita beletro*

*Redaktis Franko Luin*

**eLIBRO**

*Aranĝis: Franko Luin*

**ISBN 91-7303-176-3**

*inko@omnibus.se*

*<http://www.omnibus.se/inko>*

NOVEMBRO 2002

## Enhavo

Pri Uzino	4
La virino, kiu forrajdis ( <i>D. H. Lawrence</i> )	5
Ĉu ekzistas anĝeloj? (2) ( <i>John Einar Åberg</i> )	16
La kaŝtano (Ivan Cankar)	37
La ĉina vazo ( <i>Margitta Palmær</i> )	41
Floroj kaj infanoj ( <i>H. E. Bates</i> )	48
Somera historio ( <i>Robert Pontnau</i> )	57
Malfeliĉo ( <i>Anton Ĉehov</i> )	67
Mi perdis Annan ( <i>Robert Pontnau</i> )	86
La sekreto de la arbaro ( <i>Gustaf af Geijerstam</i> )	92
La pretendema gasto ( <i>Pär Lagerkvist</i> )	108

## Pri Uzino

*Uzino estas legolibro kun variaj prozaj beletraj tekstoj, originalaj kaj tradukitaj. Kiel oni povas diveni el la nomo, ofte povas temi pri tekstoj daŭre prilaborataj, ĉapitroj el tradukataj romanoj, unuopaj noveloj, pli-malpli pretaj skizoj. Iujn oni povas trovi en alia formo en la interreto, aliaj aperas ĉi tie por la unua fojo. Ankaŭ tekstoj jam aperintaj en disaj gazetoj, sed malmulte konataj, povas trovi lokon en Uzino.*

*Ĉiu Uzino — la intenco estas, ke aperu pliaj — estos minimume 100-paĝa. Aŭtoroj, kiuj havas ion publikigindan povas sendi sian verk(er)on al [uzino@omnibus.se](mailto:uzino@omnibus.se).*

*Oni povas uzi ĉi tiun interretan medion por vekti la intereson de la legontoj, prezentante rakonton, novelon aŭ ĉapitron el originala aŭ tradukata romano, kies publikigo kuŝas en la fora estonteco.*

Franko Luin

## La virino, kiu forrajdis

### I

**Ŝ**i pensis, ke tiu geedziĝo, pli ol iu alia, estos aventuro. Ne estis tiel, ke la viro havis laŭvorte magian fascino al ŝi. Li estis malgranda, nervema, malrekta, dudek jarojn pli aĝa, kun brunaj okuloj kaj grizaj haroj, orfo, veninta al Ameriko el Holando, plurajn jarojn pli frue, kiam li ankoraŭ estis knabeto, kaj el la orminejoj de la Okcidento, piedbate li alvenis al la Sudo, al Meksikio, kaj nun estis pli malpli riĉa posedanto de arĝentminejoj en la sovaĝa soleco de Sierra Madre: la aventuro, kompreneble, dependis pli de la cirkonstancoj ol de la persono. Li estis tamen daŭre dinameto da energio, pluvi-vinta malgraŭ akcidentoj: kaj tion, kion li atingis, li atingis per propraj fortoj. Unu el tiuj homaj apartaĵoj, kiuj malakordiĝas kun ĉia klasifiko.

Kiam ŝi fakte vidis, kion li atingis, ŝia koro estis timigita. Grandaj montaj altaĵoj, verdkovritaj, netuŝitaj, kaj meze de tiu senviva soleco ruĝecaj kaj senvivaj amasoj

da sekiĝinta ŝlimo, eligita el la arĝentminejoj. Sub la nudeco de la minejo la domo el krudaj brikoj, unuetaĝa, ĉirkaŭata de muroj, kun ĝardeno meze kaj vasta verando kun grim pantaj tropikaj plantoj je la flankoj. Kaj kiam oni rigardis el tiu *patio* florplena, oni vidis alte supre, kontraŭ la ĉielo, la ruĝecan konuson de la ruboj de arĝentŝlimo kaj la maŝinaron por eligi ĝin. Nenion alian.

Certe, la lignaj pordegoj estis ofte malfermitaj. Kaj tiam ŝi restis ekstere, en la vasta malferma mondo, kaj rigardis la grandajn malplenajn arbokovritajn montojn, kiuj amasiĝis unu post la alia, de nenio al nenio. Aŭtune ili estis verdaj, dum la aliaj jarperiodoj ruĝecaj, senvivaj kaj abstraktaj.

Kaj la edzo, en sia foruzita Ford, veturigis ŝin al la senviva, trioble senviva, hispana urbeto, forgesita inter la montoj. Senviva kaj sunbrulita la granda preĝejo, senvivaj la grandaj portaloj, la kovrita senespera merkato, kie ŝi vidis, la unuan fojon kiam ŝi venis tien, mortintan hundon kuŝanta inter la viandobenkoj kaj la verdaĵbudoj, kuŝanta kiel por la eterneco, kaj neniu ĝenis sin por forĵeti ĝin. Morto kun morto.

Kaj ĉiuj parolis mallaŭte pri la arĝento kaj montris pecojn da mineralo. Sed la minejoj ne estis aktivaj. Dum la granda milito la merkato de arĝento estis morta merkato. La minejoj de la edzo fermitaj. Sed li kaj ŝi vivis en

la brikdomo, sub tiuj minejoj, inter la floroj, kiuj por ŝi neniam sufiĉe floris.

Ŝi havis du infanojn: knabon kaj knabinon. Kaj la pli aĝa, knabo, estis preskaŭ dekjara, antaŭ ol ŝi vekiĝis de tiu stuporo de subjugita miro. Ŝi estis nun tridektrijara, solida virino, bluokula, malobtuza, kiu komencis dikiĝi. Ŝia edzo, malgranda, nervema, tenaca, malrekta, bluokula, estis kvindektrijara, viro ŝtale malmola, ŝtale tenaca, ankoraŭ plena da energio, sed malfortigita de la falo de la arĝento sur la merkato kaj de stranga neakcesebla flanko de la edzino.

Li estis homo kun principoj kaj bona edzo. Iasence li estis enamiĝinta al ŝi. Sed li neniam montris tiun sian surprizan admiradon. Esence li tamen restis daŭre fraŭlo. Li estis dekjara fraŭleto, kiam li estis ĵetita en la mondon; kiam li edziĝis, li jam estis pasinta la kvardekan jaraĝon kaj havis sufiĉe da mono por edziĝi. Sed lia kapitalo estis kapitalo de fraŭlo: estro de siaj propraj entreprenoj, la edziĝo restis ankaŭ entrepreno, la lasta, kaj la plej proksima al lia koro.

Li plene admiris sian edzinon, li admiris ŝian korpon, la karakteron. Kaj por li ŝi ĉiam estis la kalifornia junulino el Berkeley, fascina kiel la unuan fojon, kiam li renkontis ŝin. Li gardis ŝin inter tiuj montoj de Chihuahua, kiel farus ŝejko. Li estis ĵaluza je ŝi same kiel li estis je la arĝentminejo: kaj tio ne estas malmulto.

Ŝi, je la aĝo de tridek tri, estis daŭre la junulino el Berkeley en ĉio, escepte de la fiziko. La evoluo de ŝia konscio mistere ĉesis kun la edziniĝo, tute ĉesis. Ŝia edzo por ŝi neniam fariĝis reala: nek mense nek fizike. Malgraŭ la granda pasio, kiun li sentis, li neniam signifis ion por ŝi, fizike. Nur morale li havis iom da influo, li subigis ŝin kaj tenis ŝin en nevenkebla sklaveco.

Tiel pasis la jaroj en la brika domo ĉirkaŭanta la sunplenan *patio*-n je la piedoj de la arĝentmontoj. Ŝia edzo neniam estis trankvila. Kiam la arĝento senvaloriĝis, li akceptis gvidadon de bieno pli sube, je distanco de dudek mejloj, kaj bredis pursangajn porkojn, belegajn bestojn. Samtempe li malamegis porkojn. Li estis skrupula restaĵo de idealisto kaj malamis la materian flankon de la vivo. Li amis laboron, laboron, laboron, kaj aranĝi aferojn. Lia edzeco, liaj gefiloj estis parto de liaj entreprenoj, sed en tiu ĉi kazo kun sentoparto.

Iom post iome ŝiaj nervoj ekribelis: ŝi devis eliri de tie. Ŝi devis eliri. Tial li kondukis ŝin dum tri monatoj al El Paso. Tio almenaŭ estis Usono.

Sed li retenis sian magian potencon super ŝi. La tri monatoj finiĝis: ree hejme, ĉiam la samo, en ŝia brika domo inter tiuj eternaj montoj eterne verdaj, aŭ brunruĝecaj, malplenaj kiel povas esti nur io neniam malkovrita. Ŝi edukis la infanojn kaj kontrolis la junajn meksi-



kanojn kiuj servis ŝin. Kaj kelkfoje la edzo alportis vizitantojn, hispanojn aŭ meksikanojn aŭ foje eĉ blankulojn.

Li vere ĝojis se blankuloj restis tie. Sed dum ili estis tie, li ne havis minuton da trankvilo. Estis kiel se lia edzino estus speciala sekreta vejno da metalo en liaj minejoj, kiun neniu alia ol li rajtis koni. Sed ŝi estis fascinita de tiuj junaj sinjoroj, mininĝenieroj, de tempo al tempo ŝiaj gastoj. Ankaŭ li estis fascinita, se li troviĝis antaŭ vera ĝentilhomo. Sed li estis malnovstila ministro kun edzino, kaj se unu el tiuj sinjoroj rigardis la edzinon, li havis la senton kvazaŭ la minejo estis prirabita kaj la sekretoj malkaŝitaj.

Unu el tiuj junaj sinjoroj donis al ŝi la ideon, iun tagon, kiam ili sidis ekstere ekster la grandaj balkonporoj kaj rigardis la panoramon. La eternaj montoj, senmovaj, estis ĉiuj verdaj: estis septembro, post la pluvoj. Ne estis ajna vivosigno, nur la malplena minejo kun la abandonitaj maŝinoj kaj grupo da ministaj domoj, duonmalplenaj.

”Mi ŝatus scii,” diris la junulo, ”kio estas malantaŭ tiuj grandaj senvivaj montoj.”

”Pli da montoj” diris Lederman, la edzo. ”Se oni iras en tiun direkton oni venas al Sonora kaj al la marbordo. Je ĉi tiu flanko la dezerto — vi alvenis de tie — kaj je la alia montetoj kaj montoj.”

”Jes, sed kiu *vivas* sur la montetoj kaj montoj? *Certe* io mirinda! Ili aspektas *kiel* neniu alia loko sur la tero: kiel se ili estus sur la luno.”

”Estas multe da sovaĝaĵo, se vi volas iri ĉasi. Kaj plue indianoj, se *tion* vi nomas mirinda.”

”Ĉu sovaĝaj?”

”Relative.”

”Sed amikaj?”

”Dependas. Kelkaj estas tre sovaĝaj kaj ne permesas al iu ajn proksimiĝi. Ili mortigas misiistojn tuj kiam ili vidas ilin. Kaj kie ne povas iri misiisto, neniu iras.”

”Sed kion diras la registaro?”

”Ili estas tiel foraj, ke la registaro ne okupiĝas pri ili. Kaj ili estas ruzaj: se ili pensas, ke ili ricevos ian ĝenon, ili sendas delegacion al Chihuahua kaj formale submetiĝas. La registaro kontente lasas la aferojn, kiaj ili estas.”

”Kaj ili daŭre vivas kiel sovaĝuloj, kun siaj sovaĝaj kutimoj kaj sia religio?”

”Ho, jes! Ili ne uzas alion ol arĉojn kaj sagojn. Mi vidis ilin en la urbo sur la placo, kun amuzaj ĉapeloj ornamitaj per floroj kaj arko en unu mano, preskaŭ tute nudaj, ĉar ili surhavas nur iaspecan ĉemizon, ankaŭ kiam malvarmas — ili iras per tiuj sian nudaj piedoj de sovaĝuloj.”

”Sed ĉu vi ne kredas, ke estas mirinde en tiuj iliaj kaŝitaj vilaĝoj?”

”Ne. Kio povus esti mirinda? La sovaĝuloj estas sovaĝuloj kaj ĉiuj sovaĝuloj kondutas pli malpli sammaniere, tre longbarbaj kaj malpuraj, sen higienaj normoj, kun ia lerta ruzaĵo kaj ĉiam batalantaj por sufiĉa manĝo.”

”Sed ili certe havas malnovegajn religiojn kaj misterojn — *devas* esti mirinde, mi certas.”

”Mi nenion scias pri la misteroj — hurlado kaj paganaj kutimoj, pli aŭ malpli maldecaj. Mi vidas nenion mirindan en tio, en tiaspecaj porkaĵoj. Kaj mi miras ke vi, kiu vivis en Londono aŭ Parizo, aŭ en Novjorko, vidas ion tian —”

”Ha! *Ĉiuj* vivas en Londono, aŭ en Parizo, aŭ en Novjorko,” — diris la junulo, kvazaŭ tio estus argumento.

Kaj lia malcerta kaj speciala entuziasmo pri la nekonataj indianoj trovis profundan reeĥon en la koro de la virino. Ŝi estis subjugita de stulta romantikismo pli nerealeca ol tiu de knabino. Ŝi sentis, ke estas ŝia sorto vagadi en la sekretajn rifuĝejojn de tiuj montaraj indianoj, misteraj kaj mirindaj.

Ŝi kaŝis sian sekreton. La junulo estis forironta kaj ŝia edzo kuniris ĝis Torreón pro komercaj kaŭzoj: li forestos dum kelkaj tagoj. Sed antaŭ la foriro ŝi paroligis la edzon pri la indianoj, pri la vagantaj triboj, kiuj similis al la navajoj ankoraŭ libere vagantaj: pri la jakioj de Sonora; kaj pri la diversaj grupoj en la valoj de la ŝtato de Chihuahua.

Oni supozis, ke unu tribo, la ĉilĉuoj, vivantaj en alia valo en suda direkto, estas sankta tribo al ĉiuj indianoj: la posteuloj de Montezuma aŭ de la antikvaj aztekaj kaj totonakaj reĝoj daŭre vivis inter ili kaj la maljunaj pastroj retenis vivanta la antikvan religion kaj faris homoferojn. Tiel oni diris. Kelkaj sciencistoj estis en la vilaĝo de la ĉilĉuoj kaj revenis maldikaj kaj elĉerpitaj pro malsato kaj grandaj malhavo, kunportantaj multajn strangajn barbarajn kultobjektojn, sed sen esti vidintaj ion eksterordinaran en la malsatanta kaj kruda vilaĝo de la sovaĝuloj.

Malgraŭ tio ke Lederman parolis tiel senrespekte, estis evidente, ke li sentis iom de la komuna ekscitiĝo je la penso pri la antikvaj kaj misteraj sovaĝuloj.

”Kiom longe for ili estas?” ŝi demandis.

”Ho! Tri tagojn per ĉevalo — post Cuchitee kaj la lago, kiu estas tie supre.”

Ŝia edzo kaj la junulo forveturis. La virino preparis siajn frenezajn planojn. Dum la lasta tempo, por rompi la monotonecon de sia vivo, ŝi turmentis la edzon, ke li permesu al ŝi kunrajdi, jen kaj jen. Neniam estis permesite al ŝi eliri sola. La lando ne estis tre sekura, senleĝa kaj kruda.

Ŝi tamen havis sian ĉevalon kaj ŝi revis, ke ŝi estas libera, kiel ŝi estis kiel junulino, inter la kaliforniaj montetoj.

Ŝia filino, naŭjara, troviĝis nun en malgranda monaĥinejo en la hispana minista urbeto duonmalplena, kvin mejlojn for.

”Manuel,” la virino diris al la servisto, ”mi iras per ĉevalo al la monaĥinejo por viziti Margaritan kaj porti al ŝi kelkajn objektojn. Eble mi restos dum la nokto en la monaĥinejo. Atentu pri Freddy kaj ke ĉio estas en ordo ĝis mia reveno.”

”Ĉu mi venu kun vi, per la ĉevalo de la mastro, ĉu eble Juan?” la servisto demandis.

”Neniu el vi. Mi iros sola.”

La juna viro rigardis ŝin en la okulojn, montrante proteston. Absolute neeble, ke la virino rajdu sola!

”Mi iros sola,” ripetis la solida virino, kun kvieta esprimo kaj belaj trajtoj, kun speciala aroganta emfazo. Kaj la viro, silente kaj kontraŭvole, cedis.

”Kial vi iras sola, panjo?” demandis la filo, dum ŝi preparis kelkajn pakaĵojn kun manĝo.

”Ĉu mi *neniam* rajtas resti sola? Ĉu eĉ ne momenteton de mia vivo?” ŝi kriis kun subita energieksplozo. Kaj la knabo, same kiel la servisto, restis senvorta.

Ŝi foriris sen riproĉoj, rajdante sur sia forta roana ĉevalo, vestita en rajdvesto el kruda lino, rajdjupo super lina pantalono, kun ruĝa kravato sur blanka ĉemizo, kaj nigra feltoĉapelo surkape. Ŝi kunhavis manĝaĵon en la selpoŝoj, soldatbotelon kun akvo kaj larĝan indiĝenan

kovrilon, ligita malantaŭ la selo. Ŝi forrajdis de hejme rigardante antaŭ sin, longe antaŭen. Manuel kaj la knabeto staris ĉe la pordego por vidi ŝin foriri. Ŝi eĉ ne turniĝis por mansvingi salute.

Kiam ŝi estis rajdinta dum mejlo, ŝi forlasis la sovaĝan vojon kaj laŭiris malgrandan padon dekstre, kiu kondukis al alia valo, en krutajn lokojn, kun grandaj jarcentaj arboj, kaj trapasis alian forlasitan minareon. Estis septembro, la akvo fluis rapide en la rojeto, kiu akvigis la minejon, nun forlasitan. Ŝi descendis por trinki, kaj trinkigis ankaŭ la ĉevalon.

Ŝi vidis kelkajn indiĝenojn alveni inter la arboj, supre sur la deklivo. Ili vidis kaj atente observis ŝin. Ŝi ankaŭ observis ilin. La tri personoj, du virinoj kaj junulo faris longan kromvojon por ne proksimiĝi tro al ŝi. Ŝi ne atentis tion. Ree sur la ĉevalo ŝi rajdis antaŭen en la silentan valon, preterpasante la arĝentlaborejon kaj ĉiujn signojn de minejo. Estis daŭre malklara pado inter rokoj kaj disemitaj ŝtonegoj, kiu kondukis al ankoraŭ alia valo. Laŭ tiu pado ŝi jam iris foje kun la edzo. Laŭ tio, kion ŝi sciis, ŝi devos iri suden.

Strange, ŝi ne timis, malgraŭ tio, ke estis timiga regiono: silentaj krutaj deklivoj de la fatalaspekta monto, indiĝenoj, kiuj jen kaj jen aperis en la foro, suspektemaj kaj fuĝemaj inter la arboj, grandaj korvoj, kiuj kelkfoje

rondflugis, kiel muŝegoj, longe for, super kadavro aŭ super bieno aŭ grupo da kabanoj.

**D. H. Lawrence**

*Fragmento el samtitola rakonto*

*El la angla tradukis Margaret Munrow*

## Ĉu ekzistas anĝeloj? (2)

### Juna viro ricevas perspektivan postenon

**E**stas la dudekkvara de majo. La vetero plej bona de-  
zirebla. Je la naŭa kaj duono Hagson staras sur sia  
loko, vestita per nigra oficjaketo kun orumitaj butonoj.  
Lia kravato estas malbone nodita. La kaŭzo ne estas tek-  
nika: la kravato estas foruzita.

Je la naŭa kaj duono malfermiĝis la pordo. Ĉio pretas  
por nova labortago.

La unua alvenanto estas kontisto Johansson ĉe kores-  
pondado. Neniam tio malsamas. Se la pordoj malfer-  
miĝas tridek sekundojn tro malfrue, li staras kaj saltas  
ambaŭpiede. Li estas laborformiko kiel malmultaj. Li ha-  
vas maldikan korpon, estas tre nervoza kaj ĵetas sin tuj  
supren en la ŝtuparo. La lifto estas tro malrapida. Li tuf-  
tufas supren per rapidtrajna rapideco kaj ve al tiu, kiu  
renkontas lin en kurbiĝo kaj ne flankeniras.

La banko havas specialan dosieron kun denuncoj, kiuj  
neniam estis senditaj al la Nacia Asekura Aŭtoritato. Sur



ili la kaŭzo de la akcidento estas indikita jene: renkontis kontiston Johansson en la ŝtuparo.

Johansson estas tiel kapabla oficisto, ke la banko volonte prenas la malgrandan memkoston.

Poste enfalas unu post la alia. La tempo estas malrapida *andante* kaj la fluo relative longe egala. Sed dum la kritikaj minutoj antaŭ kaj post la naŭa ili ambaŭ ŝanĝiĝas. La digneco estas for, la tempo povas plej bone esti priskribata kiel mallonga galopo. Estas la kutimaj ĉiamuloj kaj unu aŭ alia esceptulo.

Fraŭlino Günther estas unu el tiuj, kiuj venas ĝustatempe. Ĉi matene ŝi venis per aŭto. Ŝi estas fianĉino de ŝipposedanto, kaj ĉar ŝi venis per centĉevala Alfa Romeo, Hagson konkludas, ke la fianĉo veturigis ŝin. La konkludo ne estas speciale inteligenta; malgraŭ tio ĝi estas korekta.

Ŝi estas ĉiam tre bele vestita, kaj estas klare, (opinions Hagson kaj multaj kun li), ke ŝia salajro ne sufiĉas por la vestelspezoj. La konkludo estas inteligenta; malgraŭ tio ĝi estas malkorekta.

Juna virino, kiu estas fianĉino de ŝipposedanto, kiu estas alte taksata kliento de provinca banko, kaj samtempe membro de ĝia estraro, ne havas salajron laŭ ordinara salajrokontrakto. Sed pri tio oni ne skribas en cirkuleroj.

Odoraças de ŝi, laŭ Hagson, tio estas, ŝi odoras de parfumo. Li riverencas malmulte por ŝi kaj portas la manon al la nazo, sed ne antaŭ ol ŝi turnis la dorson.

Baldaŭ post la naŭa la abelejo estas preskaŭ plena.

Iom antaŭ la naŭa kaj duono venas la unuaj direktoroj, Eriksson ĉe pruntoj kaj Arenberg ĉe eksterlando. Hagson riverencas ĝentile kaj nepersone, ili riverencas ĝentile kaj nepersone. Samtempe unu aŭ alia kliento komencas montri sin en la bankhalo. Kaj samtempe la maŝinoj komencas bruegi tie interne. Unuopa timema kraketado ekludas kiel malgranda temo, unu maŝino post la alia ripetas la melodion, kaj baldaŭ la muziko estas en plena evoluo. Jen ni havas la honoron! Kia muziko! La tutan tempon *presto prestissimo* kaj *forte fortissimo*. Altes-time!

Kvaronon antaŭ la deka venas Stenman. Hagson salutas. Hodiaŭ Stenman ne resalutas, sed kelkfoje li faras.

Je kvarono post la deka venas Marcus mem. Li venas ĉiam ekzakte je la sama horbato.

La abelejo estas plena.

Ekzistas stranga rilato inter la plej alta ĉefo kaj la tria pedelo. Ili renkontiĝas sur la sama nivelo. Ili komprenas unu la alian.

Neniu en la banko povas imagi, ke Marcus traktas Hagson kiel ĝentelmanon.

La alta pozicio kaj konata lerteco de Marcus — neniu kapablas superruzi lin en bankaferoj — dum la jaroj izo-  
ligis lin. La respekto de la ĉirkaŭaĵo montriĝas tiel, ke  
oni pli volonte babilaĉas ol kuraĝas diri sian sinceran  
opinion. Se oni havas iun. Marcus sentas sin soleca kaj  
ne sukcesas scii ĉion.

Precipe je unu tre grava punkto li volas scii pli, ol oni  
informas al li laŭofice. Tio estas, kion kapablas liaj subu-  
loj. Stenman, kiu devus teni lin informita, estas mem  
senespera kazo. Egocentra, memkontenta kaj stulta. Se  
oni demandas al li pri iu persono, li devas longe serĉa-  
di en sia memoro por povi lokigi lin.

Kaj tamen ne fariĝas bone. Aŭ li nenion scias.

Sed Marcus trovis iun, kiu konas ĉiujn kaj ĉion, kaj kiu  
kuraĝas diri, kion li opinias: Bernt Hagson. Krom tio li  
povas fidi je Hagson, eĉ ne vortero eliras el lia buŝo.

Direktoro Marcus estas pli ol sesdekjara. Iam li certe  
bone aspektis, la vizaĝtraĵoj estas regulaj kaj lia staturo  
aspektas bone. Li havas lipharojn, estas relative mal-  
granda kun ĉiutaga korpostrukturo. Lia rigardo, kiu po-  
vas esti tre akra, estas hodiaŭ laca, li aspektas deprimi-  
ta kaj ne moviĝas laŭ sia kutima rapideco.

Per unu rigardo Hagson rimarkis ĉion.

—Bonan matenon, direktoro, li salutas. La direktoro  
aspektas laca, kiel statas hodiaŭ?

Neniu alia kuraĝus veni kun tia demando.

Marcus haltas.

—Dankon pro la demando, Hagson, estas merdo hodiaŭ! Fariĝas maljuna. Li apogas sin sur la bastonon.

—La direktoro nur parolas, Hagson diras kuraĝige. Nura knabo!

Marcus skuas sian kapon.

—Dankon, dankon! Mi tamen estis ĉe kuracisto hieraŭ. Li admonis min. Prenu la vivon facile, li diris. Fortranĉu la zorgojn kaj la telefonon. Estas facile diri tuli-porozo! Fortranĉu! Estas la samo kiel fortranĉi la vivon. Kun mia karaktero. La direktoro montris al sia koro.

Ne estas facile subite respondi je tio.

—Ne, diras Hagson, ne ... sed la direktoro povas doni iom da sia laboro al aliaj?

Marcus levas la ŝultrojn. Malrapide, pripenseme.

—Kiam oni estas juna, oni surprenas, kiom oni kapablas. Kiam oni fariĝis maljuna, oni staras tie kun la tuto. Fortranĉi iom estas la samo kiel ... ne, ne, Hagson, mi kredas, ke mi daŭrigos ankoraŭ iomete. Estu aŭ malestu.

Li turnas sin por daŭrigi kaj Hagson malfermas la pordon de la lifto. Enirante, Marcus rehaltas.

—Hagson, diru, ĉu vi konas Kroll en kontoro kvar?

Hagson delonge atendis tiun demandon. Li scias, kiajn planojn Marcus havas por Kroll, sed li mem havas tute aliajn. Li ne malcertas, ke li sukcesos realigi siajn, se

li uzos ĝustan taktikon. Ankaŭ li laboras por la bono de la banko.

Ne restas multaj sekundoj je dispono. Laŭ sia naturo li sekvas sian plej aŭdacan ideon.

—Direktoro, li diras, ne metu Kroll al dek ses!

Marcus estis surprizita, ja, surprizitega.

—Hagson scias pli ol mi mem, li murmuras, mi ne komprenas ... se mi scius, kie li havas siajn fontojn ... nu, mi ne esploros ...

—Temas nur pli kunigo de du kaj du, kiel la prostitu-  
agentino diris, kiam ŝi devis klarigi, kiel ŝi riĉiĝis, Hag-  
son respondis senperturbe.

Marcus akre rigardis lin. Nenio estis pli senutila. Kvin-  
cent oficistoj tremus pro tia rigardo, Hagson ridetis.

—Stenman volas doni al li dek ses, tio estas certa, li diris rapide. Se li venas tien, li ne estos aktuala, kiam Ström ĉe pruntoj finos venontjare, kaj tie la vartinfano de Stenman, Westin, estus memklara. Krom tio Kroll ne taŭgus je dek ses.

—Aŭdu, aŭdu, Marcus diris. Li pripensis dum duona minuto, poste diris akre:

—Kio estas erara kun Westin?

Sed la venenaj dentoj estis for. Li estis sendanĝera.

—Homojn, kiuj lekas la postaĵojn, oni timu. Jam nun li detruas la vivon al la plej multaj. Se li fariĝos kontisto, ni povos ĉiuj fari niajn testamentojn.

—Li estas kapabla kaj lojala, Marcus diris kun emfazo.

—Plej multaj estas, sed ili estas krom tio afablaj.

Marcus cerbumis. La kuglo trafis, kaj Hagson elspiris pro malstreĉiĝo. Tiu ŝipo neniam levos la ĉefflagon. Sed restis malgranda detalo, la punkto super i.

—Ĉu ne Huss anoncis sin por dek ses? li demandis.

Marcus skuis la kapon.

—Mi ne scias, mi ne konas la nomon. Stenman ne menciis lin.

—Dek ses kuŝas en la havena kvartalo, Hagson diris, kaj ili havas ĉefe fiŝistojn kaj homojn el la insularo. Kroll ne scias trakti ilin, li nomas ilin sinjoroj, kaj tion ili ne povas toleri. Huss estas mem de tie ekstere, li orientiĝas en la insularo kiel en sia propra poŝo, kaj li povas senhăŭtigi limandojn.

—Huss, Huss! Marcus cerbumis. Mi parolos ...

Li ne havis la okazon diri, kion li intencis, ĉar ili estis interrompitaj de kolera voĉo de supre.

—Ha-lo tie sube! Kiu diablo staras tie kaj tenas la lifton?

Marcus skuiĝis. Senvorte li eniris la lifton, Hagson fermis la pordon post li. La lifto glitis sensone supren. La lasta, kion Hagson vidis de Marcus estis la nigraj ŝtrumpoj kaj paro da poluritaj ŝuoj.

Hagson ridetis malice. Li rekonis la voĉon de Stenman.

Kio okazos nun?

Verŝajne nenio, se li ne mem prizorgos la aferon.

Li aŭskultis supren kaj esperis, ke la lifto daŭrigos preter la dua etaĝo. Stenman morttimis Marcus, ne nur ĉar li estis la plej alta ĉefo, sed ankaŭ ĉar li ree kaj ree montris terurigan kaj nekompreneblan konon pri la personaro. Li sciis ĉion, kion Stenman devus scii, sed pri kio li ne havis la plej palan ideon.

La lifto haltis je la dua etaĝo. Bedaŭrinde! Nenio plia sur tiu fronto. La korbo- kaj trumpordoj malfermiĝis kaj fermiĝis, poste la lifto restis staranta.

Ĉu Stenman kuraĝos premvoki ĝin supren kaj veturi suben preter la dua etaĝo? En tia kazo ...

Hagson atendis dum dek sekundoj. La lifto ne moviĝis. Li premvokis ĝin suben kaj reiris al sia loko.

Pasis kvin minutoj, eble dek, kaj Stenman venis piede. Li estis ruĝa en la vizaĝo kaj diris bele Bonan matenon! Hazarde li haltis antaŭ Hagson.

—Hagson, diru, ĉu iu veturis supren antaŭ nelonge? Sonis absolute tute malgrave.

—Jes, kontisto, direktoro Marcus veturis supren antaŭ momento.

—Ĉu li estis so... parolis kun iu?

—Jes, kun la guberniestro, nur kelkajn sekundojn, ĉar iu malbonedukitulo kriis pri lifto. Saluton, diris la guberniestro, estas plej bone foriri, tiel koleraĵ ili ne estas en la aliaj bankoj, kie ni ne havas niajn negocojn. Marcus diris, ke mi notu tiujn, kiuj venas suben, kaj raportu ilin al la kontisto por pliaj aranĝoj. Sed ĝis nun estis nur la kontisto.

Stenman genufleksis, kiel se li intencus eniri neekzistantajn starttruojn. Li tute turniĝis, sed returnis sin sur la supra ŝtupo kaj diris la solan diron, kiun li povis diri:

—Ne forgesu raporti al mi!

—Tion mi faros kun plezuro!

Kaj tio estis la sola eldiro, kiun Hagson povis fari.

Nun la horo estis pli ol la dekdua, kaj Hagson estis ŝvitinta por la ĉiutaga pano dum pluraj horoj.

Estis benita mateno. Li ekbatalis deproksime kun Stenman kaj venkis du decidajn venkojn. Vera nokaŭto! Supraĵe Hagson aspektis distriĝema. Li pritraktis sin mem, dediĉis sin al matena pripensado, en kio li estis vera kompetentulo. La tria pedelo en granda banko, kun ebleco fariĝi unua pedelo, tenis unu el la decidaj fadejoj en sia mano. Ĉu ne promocioj estas grava fadejo? Sur la ŝultroj de la ĉefoj kuŝas la tuta banko. Se oni prizorgas la aferon en ĝusta maniero, ĉu ne promociado de ĉefoj estas la plej grava fadejo? Ĉi tie en la vestiblo ili



decidiĝis, kaj estis li, kiu decidis ilin. Dum la lastaj tri jaroj estis en la praktiko li, kiu decidis pri ĉiuj.

Li, Bernt Hagson. Oni parolis pri la favoro havi episkopon kiel onklon. Ĉit! Estis pli bone esti amiko de Bernt Hagson.

En ĉiuj kazoj Marcus sekvis lian konsilon. En ĉiuj kazoj liaj konsiloj montris sin sukcesaj. Tio montriĝis, perspektive. Plej bone estis, ke en ĉiuj kazoj liaj konsiloj malakceptigis la proponojn de Stenman. Neniu miro, ke Stenman estis nervoza kaj timis Marcus.

Stenman povis sendi la homojn kien li volis. Sed promocii ilin, ne, neniam!

Tion faris Bernt Hagson.

Imagu, kiel oni komplezemis al Stenman! Pli ol unu ŝvitigis la kalsonojn pro li. Kiu komplezemis por li, Bernt Hagson?

Hagson ridetis por si mem. Neniu! Sed ankaŭ ne estis bezonate!

Li estis tia, kia li estis. Sperta! Neniu superruzis lin!

Li havis modestan oficon, tio estis vera. La personaron, la kamaradojn, oni povus diri, se nur oni ne diris tion tro laŭte, eblis dividi en diversajn grupojn: direktoroj, kontistoj, grupĉefoj, pedeloj kaj sendknaboj. Estis pli facile por oficisto fariĝi direktoro ol por pedelo fariĝi oficisto. Je multaj punktoj sentiĝis la klasdiferenco. Kiam temis pri necesejoj, en la manĝejo, sed precipe en la

bankhalo. Se kompatinda pedelo iris tra la planko, iaj ok aŭ dek oficistoj povis samtempe krei Pedelo, ĉi tien! Li ja ne estas ambulanco!

Tial estis mirinda sento scii, ke en la vero li havis multe da influo.

Kaj tio ne estis la sola kaŭzo esti kontenta. Por lunĉo oni servis porkkotleton kaj la unuaj raportoj, kiuj ĵus alvenis, rakontis, ke ĝi estas bonega. Akviĝis en la buŝo de Hagson.

Estis en la vero riĉa tago.

Kaj nun la horo estis, kiel dirite, post la dek dua.

La pordoj al la strato malfermiĝis kaj iu eniris malrapide. Ekbrilis en la fenestroj, amaso da sonoj enĵetiĝis: sonoj de la tramoj, boatoj kaj mevoj kaj ondado, sekvis sunbrilo kaj logo kun ĉiuj tiuj intense enirantaj sonoj.

El la bankhalo venis la kutima monertintado kaj maŝintusado. Ĉiuj susuris per paperoj kaj sonis kiel aŭtuna ŝtormo. Ambaŭ sonorkanoj renkontiĝis tie, kie Hagson staris. La libera naturo de Dio falis en lian dekstran oreilon kaj la mallibera de la homo en lian maldekstran, unu envenis pro eraro, la alia volis eliri. Hagson preskaŭ falis. Li rigardis ĉirkaŭen por trovi apogon kaj rimarkis junan viron, kiu staris kaj ĉirkaŭrigardis heziteme. Hagson tuj vekiĝis.

Jen INFORMOJ estis bezonataj.

La juna viro povis esti minimume dudek, maksimume dudek kvin jarojn aĝa. Li estis diketa, kun helbruna haŭto, brunaj okuloj kaj malhela, bele kombita hararo. Li surhavis elegantan kostumon kun freŝe gladitaj faldoj, la kravato estis bone nodita kaj nekredeble bunta, ĝi igis vin pensi pri dancantaj negrinoj aŭ eksigitaj financministroj. Sub la brako li tenis libron. La negrinoj, la okuloj kaj la haŭto donis al li eksterlandulan aspekton. Hagson divenis pri usonano.

—Dujspikingliŝ? li demandis per sia plej libera parolo.

—Ne, ĉu vi? estis la respondo.

La fremdulo aspektis naiva kaj ĝentila, kaj liaj vortoj ne ŝajnis havi ironian nuancon. Sed Hagson tamen fariĝis senresponda. Nek Stenman nek Marcus aspektis kiel virguloj, ilin li facile likvidis. Ne ekzistas justeco, se li nun kaptiĝos. Li surprenis sarkasman mienon, sed tio estis forĵetita laboro, ĉar la fremdulo ne rigardis lin, sed ĉirkaŭrigardis en pura scivolemo. Estis malfacile diri, kia li fakte estas.

Ĉu vira familiano aŭ iu el la universitatoj en Hall aŭ Bona?

Kiam la fremdulo rigardis prete, li montris al la bankhalo.

—Ĉu estas ĉiam tia bruegaĉo en tiu ĉambrego?

—Ne nokte, Hagson respondis. Cetere oni kutimiĝas. Jam post kelkaj jaroj oni povas dormi sen inkuboj.

La fremdulo kapjesis cerbumante serioze. Lia posta demando estis nova surprizo.

—Ĉu multaj serĉis la postenon?

—Kiun postenon?

—Ĉi tiun! Li malfermis la libron kaj elprenis gazeteltondaĵon. Dio benu min! Hagson restis senspira, li konis ĝin parkere.

—Vi estas la unua, Hagson diris, kiam li rekolektis siajn fortojn. Ni anoncis ĉiun tagon dum ĉi tiu monato.

### Perspektiva ofico

Ordema juna viro kun preta soldatservo ricevas postenon kiel pedelo en AS Haringobanko. Senpaga lunĉo. Turnu vin persone al kontisto Stenman inter la 11-a kaj 1-a, kunprenante atestojn.

—Kia bonŝanco, ke mi vidis la anoncon!

—Hm!

—Ĉu oni ricevas bonan manĝon ĉi tie?

Hagson komencis trovi sin mem.

—Kelkfoje! Sed tio varias. Hodiaŭ ni havas porkajn kotletojn, ili estas bonegaj.

—En plej malbona kazo oni povas iri eksteren tagmanĝi. Estas amaso da manĝodoro ĉi ĉirkaŭe.

Hagson levis la brovojn kaj alprenis ĝentilan tonon.

—Certe! Eblas havi rezervitan tablon ĉe Grand, tiel vi ne bezonas atendi. Aŭ ĉe Palace, tien iras la direktoroj.

—Palace estas manĝejaĉo, la fremdulo diris kun kvieta kaj konvinka kono.

Hagson ĉirkaŭrigardis dum momento senhelpe. Sed la fremdulo ne rimarkis tion, kaj daŭrigis:

—Kio estas la plejo, kio oni povas fariĝi en ĉi tiu loko.

Dua pedelo, Hagson havis sur la lango, ĉar unua li intencis fariĝi mem. Sed li sentis kompaton al la verdulo kaj diris:

—Aganta direktoro!

La fremdulo ekfajfis.

—Kion li faras?

—Skribas sian nomon, iras al kunsidoj kaj tagmanĝas, Hagson informis rapide kaj malfidinde.

—Skribi mian nomon kaj tagmanĝi, tion mi jam scias, lerni la alian ne devus esti tiel granda arto. Kioman sa-lajron li ricevas?

—Iajn kvindek mil jare, Hagson divenis. Senpagan manĝon, aŭton de la banko kaj longegan libertempon. Kaj trimil jare da altigo, se li bone kondutas.

La fremdulo aspektis nur kontenta.

—Mi havis ĉiam grandan A en konduto, li diris kaj daŭrigis kalkuli je la fingroj. Tridek mil je dek jaroj, tio fariĝas sesdek mil je dudek. Ne estas stulte!

—Ne, Hagson agnoskis kaj suspiris profunde. Tute ne estas stulte.

—Kian lernejon li vizitis? Li havas minimume gimnazian ekzamenon, ĉu?

Hagson denove eksentis firman grundon sub siaj piedoj. La vero mortigus ĉi tiun naivan kaj malspertan optimismon. Lasu la infanojn vivi!

—Jes, li diris. Kaj korespondan kurson en nacia ekonomio.

—Kaj li estas lerta je kalkulado, ĉu? Dividado kaj decimalkomoj kaj tiaj aferoj?

—Niaj kalkuliloj zorgas pri tio, tio tute ne estas bezonata!

—Estas fakte strange, la fremdulo diris. Mi devis lasi la lernejon, ĉar mi ne kapablis lerni tion. Mi miras, kiam oni entute bezonas koni dividadon. Mi neniam renkontis iun alian ol la instruiston, kiu demandis pri tio.

—Sufiĉas premi klavon, certigis Hagson, kaj la maŝinoj faras la tutan laboron. Nur aŭdu!

La fremdulo aŭskultis en la direkto de la bankhalo.

—Sonas kiel epidemio de kokluŝo, li diris.

—Kian postenon vi havis antaŭe?

—Mi? Neniun ajn.

Multon oni devas aŭdi, antaŭ ol la oreloj forfalas.

—Ĉu vi intencas diri, ke vi neniam havis iun oficon?

La fremdulo kapjesis.

—Kial mi havu, se mi ne bezonis?

Ne estis facile konfuzigi Hagson — li opiniis mem tion nebla — sed li estis fakte profunde skuita.

—Ion vi devas esti farinta?

La fremdulo skuis la ŝultrojn. Li serĉis en sia memoro kaj diris post momento:

—Mi kompreneble velboatis, kaj mi riparis la radion de mia patrino. Li haltis dum momento kaj aldonis en konvinka tono:

—Kaj mi kompreneble legis amason da libroj. Restis al mi nur unu vando en la urba biblioteko, kiam mi trovis ĉi tiun. Estas la plej bona libro, kiun mi iam legis. Dum ĝia legado mi decidis, ke mi fariĝos agema homo.

—Kiel ĝi nomiĝas?

—*La arto atingi sukceson*. Ĝi estas verkita de iu usona profesoro kun la nomo Hopkins. Estas scienca manlibro. Estas skribite, ke se oni scias, kion oni intencas fariĝi kaj centpocente klopodas, tiam la eblecoj estas naŭdek naŭ kontraŭ unu, ke oni fariĝos tio. Vi rajtos prunti ĝin poste.

Li antaŭenstreĉis la libron, sed Hagson mansignis negative. Li ne legis librojn. Li sukcesis tamen rimarki kov-

rilon kun aro da ruĝaj, grizaj kaj nigraj sagoj malsame grandaj, ĉiuj direktitaj oblikve supren al la ĉielo de feliĉo.

—Ne valoras la penon! Ne instruu al maljunaj hundoj sidi.

—Kompreneble oni ne devigu la homojn esti feliĉaj, se ili ne volas, la fremdulo diris kaj remetis la libron sub la brakon. Ĉu ĉi tiu posteno estas malfacila?

Bonan sugeston al estonta kolego oni povas ĉiam permesi al si.

—Dependas de tio, kiel fervore oni faras tion!

Hagson skuis la ŝultrojn.

—Malfermi kovertojn! Orientiĝi en la urbo! Sed tion vi povas, ja!

—Je-es, la fremdulo diris, sed lia tono ne estis same konvinka kiel ĵus. Kompreneble pli bone en la insularo!

—Sed la poŝtejon, stacidomon kaj telegrafejon vi konas?

—Ho jes! Kaj la urban bibliotekon!

—Unu aferon mi povas certigi al vi, Hagson diris. Tien vi neniam bezonos iri. Cetere, kiel vi nomiĝas? Mi estas Bernt Hagson kaj estas tria pedelo.

—Jan Froman, la fremdulo diris ĝentile kaj donis sian manon.

—Kiel vi decidiĝis pri ĉi tiu anonco?

—Estis ideo de panjo! Leginte ĉi tiun libron mi rezonadis kun panjo pri mia estonteco, kaj ŝi opiniis, se mi



tamen devos labori, ke mi same bone komencu tuj. Tio estis hieraŭ. Ĉimatene ŝi vidis ĉi tiun anoncon kaj diris: Mi sentas, ke tio taŭgos por vi. Nu, kaj ...

—Je mil diabloj, Hagson interrompis, ĉi tie ni staras kaj perdas tempon. Estos baldaŭ la unua. Venu, ni iru supren al Stenman.

Tuj antaŭ la unua iu batis diskrete je la pordo de Stenman.

Stenman levis malrapide la kapon kaj diris:

—Eniru!

Neniu eniris. Li ekkriis.

—Eniru!

La pordo malfermiĝis kaj juna viro eniris. Li havis libron sub la brako. Li fermis zorge la pordon post si, kliniĝis ĝentile kaj diris:

—Temas pri ĉi tiu posteno. Mia nomo estas ...

Stenman ne havis multajn superulojn. Fakte nur dion patron kaj Marcus. El ili li plej timis Marcus, almenaŭ ĝis nun. Kaj la incidento ĉi matene profunde skuis lin. Li ankoraŭ ne rekaptis sin.

Li kriis:

—Kiu posteno?

—Ĉi tiu, Froman diris trankvile kaj montris la anoncon.

Stenman rigardis ĝin kaj sian brakhorloĝon. Ĝi montris je du minutoj antaŭ la unua. Li diris kolere:

—Mi tagmanĝas je la unua.

—Mi legis, ke plej multaj kontoristoj faras tion, Froman diris. Mi ankaŭ faras tion, kiam mi manĝas. Tio estas taŭga tempo.

La potenculo levis majeste la kapon kaj mentonon kaj rigardis ĉirkaŭen.

Ĉu vi aŭdis, vandoj!?

Li havis malaltan frunton kaj forte kurbitan grandformatan nazon. Froman rigardis lin pristude. Li ŝajnis memori, ke li legis ie, ke granda nazo estis signo de inteligenteco.

Li devos fakte kontroli tion.

Kaj rilate al la vandoj, ili ne respondis al la persona voko de Stenman. Tial li estis devigata mem ekparoli.

—Vi serĉas ĉe ni postenon kiel pedelaspiranto?

—Mia patrino volas tion, Froman diris trankvile. Ŝi diris, ke ĝi estas perspektiva.

—Kompreneble. Ni disdonis kvin procentojn dum la lastaj jaroj kaj la akcioj estos baldaŭ laŭvaloraj.

—Temas iom pri perspektivo ankaŭ en la anonco.

—Estas malgranda sed impone bona salajro plus certigita pensio, kiam vi farigos sesdek kvin jara. Ni zorgos pri via pluedukiĝo. Komence vi ricevos senpagan korespondan kurson en ĵuĵicuo.

—Tio ĝojigos panjon. Ŝi kutimas ĉiam diri, ke estas pli bone fari malmulton ol nenion kaj ke estas pli bone gajni cent kronojn monate honeste ol mil malhoneste. Sed kompreneble, li diris pli por si mem, mil monate ne estus malbone.

Ŝajnis, ke Stenman aŭdis sufiĉe.

—Ĉu vi aŭ via patrino serĉas la postenon, li interrompis en iritita tono.

—Mi, kompreneble. Panjo ankoraŭ ne finfaris la soldatservon.

La lango de la potenculo ŝlosiĝis dum duona minuto. Kiam li fine malŝlosis ĝin, li diris:

—Ĉu vi pripensas aŭ ne? Ni havas amason da serĉantoj! Sed io en la rigardo de Froman kvietigis lin kaj li diris favorkore:

—Mi pretas provi vin. Vi aspektas bone kaj dece. Froman iom ruĝiĝis.

—Dankon, li diris simple. Estis bedaŭrinde, ke li ne povis reciproki la komplimenton. Tio devis atendi ĝis posta okazo.

Stenman prenis fontplumon, malfermis skribtablan keston, elprenis formularon kaj diris, por komenci:

—Kio estas via nomo?

Poste ĉio estis preta en du minutoj.

Kiam ĉio estis preta kaj Froman staris ĉe la pordo, li turniĝis.

—Imagu, li diris cerbume. Mi imagis al mi kontiston Stenman tute alia. Kiel maljunan onklon kun blanka barbo, kiu frapetas sur la ŝultroj kaj invitas al cigaro kaj petas, ke mi sidiĝu. Kiel oni povas erari!

La skribtablo komencis forte skuiĝi. Estis eble same bone fermi la pordon antaŭ ol ĝi alflugus kaj falus sur onin.

—Ĉu vi ricevis la postenon? Hagson demandis fervore. Froman aspektis kontenta.

—Mi komencos la unuan. Estis simpatia kaj agrabla viro. Kaj se li sukcesis fariĝi kontisto sen legi Hopkins, mi ne komprenas, kial mi ne povus fariĝi direktoro.

**John Einar Åberg**

*Dua ĉapitro el samtitola romano*

*El la sveda tradukis Franko Luin*

## La kaŝtanarbo

**E**kster la urbo, jam for de polvo kaj de homoj, vivis kaŝtanarbo en verda soleco. Oni iris ĝin rigardi, ĉar ĝi estis mirindaĵo de sia speco. Jam tute frue en marto ekburĝonis ĝia burĝonaro, dum la branĉoj de aliaj kaŝtanarboj estis ankoraŭ rigidaj, fridaj kaj nudaj. En aprilo ĝi riĉiĝis per suka foliaro, en la unuaj tagoj de majo ĝi jam senŝpare kaj donaceme superŝutis la ĉirkaŭaĵon per blankaj petaloj. Ĝi disŝutis, ĝi forsendis siajn helajn papiliojn per ĉiu vento, ĉiudirekten kaj tamen ĉiuj pli malfrue vekiĝintaj kaŝtanarboj disŝutiĝis pli frue ol ĝi, la heroo inter ili.

Aŭtune, kiam ĝiaj kamaradoj jam senfortiĝis kaj dormeme ellasadis el tremetantaj manoj la fruktojn, ĝin ĝenis nek nordvento nek frosto. Ĝia foliaro restis malhel-verda kaj bunta, ĝi susuris en la vento kaj neniam tiu susurado similis al mortkanto; la branĉoj fleksiĝis profunden, foje ĝis la tero, sed ili tuj rektiĝis, energie kaj ĝoje. Kiam la frosto skuis la heroon, ĝi kuntiriĝis kaj

kunpremiĝis, dum aliloke jam putris flava kaj bruna foliaro.

Ne estis trista ĝia morto. La heroo kuŝigas sin laca sur herbejon, dum la aliaj jam delonge estas dormantaj, trankvilaj kaj palaj, mortsimile senspiraj. Ĝi ekdormas plenfida, ke ĝi vekiĝos jam antaŭ la aŭroro. Profunde ĝi enspiras, ekridetas ensonĝe — la branĉoj ekstremetas, etendiĝas, sensone falas la neĝo de ili.

Se iam iu sidis sub tiu kaŝtanarbo, li estis juna. Alveninte plena de zorgoj kaj pezaj pensoj oni foriris serenmienaj, ĝoje jubilantaj. Geamantoj amis tie pli sincere kaj pli fidele ol sub la dia suno mem. Ĉiu unuopa folio estis signo de forto, bono kaj kredo, de ĉiu folio rosis helaj gutoj de amo. Alpilgrimis maljunulo kun lambastono; kiam ombrigis lin la kaŝtanarbo, ekkantis en lia sango juneco.

Iam sonĝis virinaĉo, la unuokula Marjeta, ke ora skarabo rampas sur la mirakla kaŝtanarbo. Ĝi rampas de la herbo, laŭ trunko al branĉo, al alia branĉo; kaj subite ariĝis tiom da skaraboj, ke baldaŭ la folioj malsufiĉis, sur ĉiu el ili sunumis sin ora dukato. Okazis, ke de unu el tiuj folioj, pro mallerteco, falis ora skarabo en la sinon de Marjeta. Konfuzite ĝi lamis de la ventro sur la bruston; fine ĝi direktiĝis laŭ la malglataj vojoj de la kolo, trans la abruptaj deklivoj de la makzeloj kaj preter la buŝprofundo rekte al la nazo. Tie ĝi rigardis en la nigran truon

kaj ne kuraĝis iri antaŭen. Tial ĝi haltinte komencis zorgeme observi siajn kruretojn por ilin ripari kaj rektigi. Dum tiu ago ĝi ektuŝis, pro neatentemo, grandan nigran nazharon, kiu kreskis el la truo. Tiam Marjeta ekternis kaj vekiĝis. La ora skarabo malaperis, neniam kaj nenie ĝi estis trovebla.

Kiam la virinaĉo, unuokula Marjeta, vekiĝis, ŝi primeditis sian songon. Senpene ŝi divenis ĝian signifon; ĉiu el ni farus la samon.

Jam antaŭ ol la horloĝo en Dravlje ekbatis la meznokton, ŝi rapidis al la celo; fosilon kaj sarkilon ŝi kunportis. Per tiuj fosilo kaj sarkilo ŝi fosis sub la kaŝtanarbo, fosadis, Dio ŝin kompatu, ĝis frumateno. Ekheliĝis jam la dia aŭroro, ke neniam plu estu tiel! Marjeta rigardis konsternita, plenvoĉe ekkriis, forĵetis la fosilon kaj sarkilon kaj fuĝis senspire, kvazaŭ freneza. Ŝi kvikis pli ol strigo; tiel ŝi fuĝis kaj kriis ĝis la vilaĝo.

”Ve, homoj de Dio! Ve, ve al mi!”

Ĉiuj venis rigardi, viroj, virinoj kaj infanoj. Inter ili troviĝis eĉ kelkaj, pri kiuj oni kredis, ke ili jam de longe estis mortintaj; oni alvenis en ledpantalonoj kaj velurveŝtoj kun miloj da butonoj; iu havis la harojn kvaste ligitajn, nobela banto flirtis surŝultre.

Ronde ĉirkaŭ la kaŝtanarbo la herbejo estis disfosita kaj plugita minimume je duonklafto profunden. Inter majestaj radikoj etendiĝantaj fiere kaj senfine en ĉiujn

direktojn, ariĝis amaso da homkranioj; la okultruoj, en kiuj iam troviĝis okuloj, estis nun plenaj de tero kaj koto; el kelkaj rapide ekĝermis herbo dum la nokto. Aliaj ostoj estis disĵetitaj zigzage, tiel ke oni ne povis scii, al kiu kranio ili apartenas. Ŝultro brakumis tibion. Sennombraj estis tiuj blankaj ostaĵoj, trankvilaj kaj malkonsekritaj de tero kaj vermoj. Se oni plufosus, kaj pli profunden, oni eble malkovrus tombejon, kian la mondo neniam vidis.

Ili staris palaj, neniuj buŝo ion eldiris.

Sed kiam ili foriris, kiam ili estis jam longe for, la viro kun kunligitaj haroj kaj banto diris:

”Nun montriĝis, de kie tiu forto, tiuj amo kaj juneco!” —

Ho, amikoj miaj karaj, ankoraŭ abunde floros kaŝtanarboj!

**Ivan Cankar**

*El la slovena tradukis Rozjka Osterman*



## La ĉina vazo

Panjo levis la rigardon de la trikaĵo. Tiu fariĝos kovrilo el mola helruĝa lanfadeno por la fratineteto, atendota dum la printempiĝo.

”Ĉu iu novaĵo en la gazeto, paĉjo?” ŝi demandis.

Paĉjo faligis la gazeton kun susureto sur la genuojn, oscedante.

”Preskaŭ neniu — novaj bombatakoj, oni invadis mal-sanulejon kaj pafbruligis kelkajn loĝdomojn, sed nenio decidiga.”

”Terura tiu milito!” panjo ekĝemis kaj daŭrigis la trikadon, ”mirinde, ke la homoj ne povas paciĝi.”

Kaj ŝi kalkulas unu, du, tri, kvar ... ŝi ĝuste atingis tiun etan malmultigon de la maŝoj, donanta al la modelo la veran elegantecon.

En tiu momento Bubeto alvenis. Bubeto estas sesjara kun bluaj okuloj kaj tuta krono da brunaj bukloj, kiujn panjo ne kuraĝis fortondi. Venontaŭtune li vizitos lernejon, tiam la bukloj devos fali, kaj pri tio Bubeto kaŝe ĝojas.

”Panjo, kion mi faru?”

”Ŝŝ — ne ĝenu panjon, dum ŝi kalkuladas! Unu, du, tri, kvar — kion vi cetere diris? Nu, jes, vi ja povas preni viajn ludilojn, eniri en la manĝejon kaj ludi momenton — poste ni eliros, paĉjo nur volas finlegi la gazeton kaj panjo nur triki tiun ĉi rondon.”

Sed Bubeto ne tuj foriris. Li restis pendiĝante sur la ŝultro de paĉjo, rigardante bildon de la gazeto.

”Paĉjo, kio estas ĉi tio?”

Paĉjo milde karesis la brunajn buklojn de Bubeto.

”Bombardita urbo, Bubeto, la domoj disfalegis en ruinojn, jen malsanulejo kaj jen lernejo dispafitaj. Nun komencu vian ludon!”

”Ke ili rajtas tiel fari, paĉjo!”

La voĉo de Bubeto tremis, sed ĉu pro nura indigno aŭ ankaŭ pro grajno da envio ne estas facile distingeble.

”Jes, estas terure,” paĉjo konsentis, ”sed dank’ al Dio tio feliĉe okazas malproksime,” li konsole aldonis.

”Nun mi scias kion fari, panjo,” Bubeto subite deklaras, ”ĉu mi rajtas ludi per la lignaj konstruŝtipetoj sur la manĝotablo?”

Panjo kapjesis: ”Certe vi rajtas, knabeto mia, sed estu singarda, nenion detruu! Pripensu la ĉinan vazon!”

Bubeto kuntiris la etajn helajn brovojn — ĉiamaj tedadmonoj pro tiu vazo! Kiel se li ne jam sciis, ke oni ne rajtas eĉ rigardi ĝin, kvankam ĝi vere estas atentinda pro

siaj akre flavaj floroj kaj gajigaj ĉinaj figuroj kun oblikvaj okuloj. Kaj kvazaŭ sago li malaperis en la dormoĉambro, kie li malantaŭ la kudromaŝino de panjo havis angulon por ludiloj, kaj li prenis plenbrakon da ŝtipetoj, kiujn li portis en la manĝejon. Trifoje li tion ripetas kaj, kiam la tablon plenplene kovras ŝtipetoj, li silente kaj fervore ekkonstruas tutan etan urbon kun stratoj kaj parkoj, domoj kaj pontoj, nubskrapuloj kaj preĝejoj kaj plej proksime al la tablorando malsanulejo.

”Nun mi estas preta,” paĉjo diris, faldante la gazeton, ”miaparte ni povas starti kiam ajn.”

Ili kutimis promeni kune ĉiun dimanĉon antaŭtagmeze, kaj se la humoro de paĉjo estas bona, ne malofte okazas, ke li invitas ilin al sukeraĵeja festeno. Tiaokaze Bubeto ricevas kirlitan kremon kun tortetoj kaj jen la plej bongusta, kion li konas.

”Ankaŭ mi povas fini kiam ajn,” panjo konsentis kaj ekfaldis la trikaĵon. ”Sed mi proponas, ke ni atendu momenton. Bubeto ĝuste komencis ludi, kaj vi ja scias, ke oni ne ĝenu infanon, kiu ludadas!”

”Kion li ludas?” sin demandis paĉjo kaj deflanke ĵetis rigardon en direkto al la manĝoĉambro. Ankaŭ panjo same faris.

”Nu, li ion konstruas, ŝajnas al mi urbo! Estas tiel plaĉe, kiam infanoj konstruas — estas tre preferinde ol ludi per stansoldatoj, aŭ io tia!”

”Mi ĉiam preferis stansoldatojn, kiam mi estis knabo,” paĉjo rimarkigis, ”kaj tamen ne fariĝis malpli bona homo pro tio.”

”Certe, sed,” panjo komencis, sed tuj haltis, ĉar el en la manĝejo oni subite ekaŭdis teruran krakadon. Ŝi forĵetis la trikaĵon kaj paĉjo la gazeton, kaj ambaŭ ili enkurigis en la manĝejon — por treti ĝuste sur la fragmentoj de io, kio iam estis la ĉina vazo.

”Bubeto, kiel vi povis, panjo ja malpermesis al vi eĉ tuŝi la vazon!”

La saman momenton oni ekaŭdas klakon kaj kret-blanka infanvango tuj fajrokoloriĝas.

”Mi ne intence faris, panjo, ne intence! La pilko resaltis!”

Panjo, kiu kliniĝis por kolekti la splitojn, subite sin rektigis.

”Pilko? Ĉu vi ne memoras, ke mi malpermesis al vi ĵeti pilkon endome?”

”Sed mi ne ludis per la pilko, panjo, mi bombardis! Kaj jen la pilko devojiĝis,” balbutas pala kaj terurita Bubeto.

”Nu panjo,” patro provis interveni, ”kompreneble estas domaĝe, sed post ĉio estis ja nur vazaĉo kaj ne pli-boniĝas per tio, ke oni faras scenon!”

Sed panjo ne volis aŭskulti.

”Vazaĉo! La ĉina vazo, kiun mi ricevis de onklo Otto kiel antaŭedziĝan donacon, kaj kiun mi tiel ŝatis!”

Bubeto ekŝajnis tedegita. La historion de la mirinda vazo, kiun onklo Otto kunportis hejmen kaj donacis al paĉjo kaj panjo je ilia geedziĝo, li jam ĝisnaŭze aŭdis — ĉu li vere devos reaŭdi ĝin?

”Estis treege altvalora vazo,” panjo daŭrigis, ”ĝi estis almenaŭ kvarcentjara kaj efektive devus aparteni al muzeo. Ĉiu homo, kiu ĉi tien venis, admiris ĝin.”

Paĉjo kompate karesis la harojn de panjo. Li ja komprenas, ke ne estas gajige perdi vazon, kiu tiel bone plenumis sian taskon — esti admirata de ĉiu homo. Kaj Bubeto kun infana persisto ripetas: ”Sed, panjo, mi ne intencis bombardi la vazon — mi intencis bombardi la malsanulejon!”

Panjo firme rigardas lin: ”Kiun malsanulejon?”

Bubeto fiere montras ŝtipeton preskaŭ pendiĝantan sur la tablorando: ”Tie ĝi estas, panjo! La malsanulejo de la gazeto!”

Paĉjo ĝuste ĵetis rigardon sur la urbon, kiu etendis sin sur la tablotabulo.

”Rigardu, panjo, kion li konstruis — estas ja fakte impone!”

Panjo rigardas.

”Sed, se vi tiel bele konstruis, kial vi nun ĉion detruas?”

Tio tro provis la paciencon de Bubeto. Kiel stultegaj la plenkreskuloj tamen estas!

”Estis ja milito, panjo, la malamikoj atakis kaj bombardis, kaj do ili nepre devis ion detrui ...”

Kaj por kvazaŭ ilustrati siajn vortojn Bubeto subite per la brako balaas la tabulon, tiel intense balaas, ke domoj kaj stratoj, preĝejoj kaj nubskrapuloj kaj la malgranda malsanulejo ĉe la tablorando per unu fojo disfalegas.

”Sed, Bubeto” panjo terurita ekkriis, ”kion vi efektive ludas?”

”Militon,” respondis Bubeto kvieta kaj tute senĝena.

Paĉjo kaj panjo rigardas unu la alian, rigardas Bubeton, la detruon sur la planko kaj ree unu la alian.

”Ĉu ni efektive scias, kion ni ludas,” panjo malrapide diris, kvazaŭ al si mem? ”Kaj kion ni legas?”

Sed neniu respondis tiun demandon, nek paĉjo, nek Bubeto, nek alia vivaĵo. Kaj ŝi eliris en la kuirejon kaj serĉis balailon kaj ŝovelilon por kunbalaado de la splitoj, dum Bubeto, sen speciala ordono, ekkolektis la ŝtipe-tojn. Paĉjo rigardadas ilin, rimarkante kiel iom post iom la detruo foriĝas, kaj la ĉambro denove ŝajnas hejmeca kaj belaspekta kiel kutime. Post momento ĉio restas sama kiel antaŭe — esceptinte la ĉinan vazon, kiu estas for.

”Nun venu, ni eliru,” paĉjo diris kaptante la manon de Bubeto, ”mi regalos vin per ĉokolado kaj kirlita kremo! Tion vi certe preferas ol ludi militon, ĉu ne?”

”Kaj frakasi ĉinajn vazojn!” panjo plibonigis.

Sed Bubeto ne respondis promenante inter paĉjo kaj panjo malsupren laŭ la ŝtuparoj. Povas esti, ke en sia interno li konsideras, ke unu la alian ne forigas, se li — kio estas dubebla, kiam temas pri malgrandaj infanoj samkiel pri grandaj — entute ion ajn konsideras pri tio, kion li entreprenas.

**Margitta Palmær**

*El la sveda tradukis Signe Boye*

## Floroj kaj infanoj

**L**a prunelarbo sin klinis super la alta deklivo supre de la vojo. Ĝiaj branĉoj estis kovritaj de blankaj floroj kaj la printempa sunlumo ĵetis puntosimilajn desegnaĵojn sur la teron, kiu estis nudtretita sub la arbo. La herbo de la deklivo estis dise priŝutita per grandaj, palbluaj violoj kaj steletoj de tusilagoj kaj lekantetoj tre similaj al la prunelfloraĵoj, kiujn okaze deskuis la vento. En la heĝo malantaŭ la prunelarbo estis grupoj da palverdaj arumoj suprenŝovantaj siajn disfalditajn kapuĉojn tra densaĵo de merkurialoj. Ili aspektis malmalvarmaj kaj pompaj. La sunlumo estis akra kaj brila, kaj kontraŭ la bluo de la ĉielo la prunelarbo estis pli blanka ol somera nuboj.

Ĉe la vojo malsupre staris vico da dometoj kaj en la malantaŭaj ĝardenoj edzinoj batadis tapiŝojn kaj klaĉadis. Pastro preterveturis sur biciklo portante gazeton kaj faskon da flavaj narcisoj. Merlo ekĉirpis kaj ĵetiĝis



trans la vojon kaj malaperis en avelarbetaĵo, kiam li pasis.

Knabino de sep aŭ ok jaroj sidis sub la prunelarbo.

La arbo estis tiel tordita kaj kliniĝinta, ke ŝi sidis tie en ia speco de ĉambro, ĉirkaŭfermita de plafono kaj muroj el florantaj branĉoj. Estis tre plaĉe kaj ĉarme tie sur la seka tero en la ŝprucmakuliga sunlumo. Depreninte sian antaŭtukon kaj sterninte ĝin sur la tero, ŝi estis metinta en ĝian centron ladskatolon, kiu iam entenis persikojn. En la skatolo ŝi nun aranĝis florojn inter hederofolioj kaj herboj. Ŝi enmetis fikariojn kaj hundvioleojn kaj tusilagojn kaj unu solan leontodon kun unu aŭ du prunelbranĉetoj. Ŝi arkigis la fingrojn tre delikate kaj residiĝis por admiri la efikon. Ŝi havis blondajn, glatajn harojn kaj ŝi estis farinta ĉenon el lekantetoj por ligi ĉirkaŭ la frunto. Ĝi donis al ŝi tre superulan kaj sinjorinecan mienon, kiu ne estis sen efiko ĉe ŝi.

Subite ŝi ĉesis aranĝi la florojn kaj komencis glatigi sian veston kaj poluri la ungojn kontraŭ la mankavoj, sidante okupata pri ili dum longa tempo. Fine estis ek-movo en la krataga arbeto je ioma distanco de tie kaj voĉo vokis kviete:

”Ĉu mi envenu nun?”

La knabino ekrigardis en direkto de la voĉo.

”Vi devas atendi, ĝis mi diros al vi,” ŝi flustris akre. Kaj tiam en tute fremda voĉo, tre altigita kaj afektita, simila al voĉo de teatra dukino, ŝi kriis:

”Mi faras mian tualeton, mia kara. Terura malagrablajo. Pardonu al mi!”

”Mi komprenas.”

”Nur momenton! Mi ankoraŭ estas en mia negliĝo.”

Ŝi komencis fari rapidajn imagajn movojn kvazaŭ el-kaj englitante vestaĵojn. Fine ŝi malfermis du butonojn ĉe la korsaĵo de sia vesto kaj reklinis la nukon, malkaŝante sian nudan bruston. Ŝi rigardis malsupren al si mem en admiro, spirante unu- aŭ dufoje, tiel ke ŝia brusto leviĝis kaj malleviĝis tre malrapide kaj milde. Ŝi donis lastan tuŝon al la floroj en la persikoskatolo kaj poste flustris:

”Vi povas enveni nun. Agadu ĝuste.”

Alia infano aperis kaj staris ekster la prunelarbo.

Ŝi estis bruna, timema, modesta kreitaĵo, ĉirkaŭ ses-aŭ sepjara, kun belaj, malhelaj okuloj, kiuj respegulis la blindigan blankecon de la prunelfloraĵoj tiel perfekte, ke ili prenis freŝan lumon de tiuj. Ŝia voĉo estis strange mola kaj timema kaj flustra.

”Ĉu mi devas rekte eniri?” ŝi diris.

”Vi devas resti en la ĝardeno antaŭe. Vi rigardas la florojn kaj poste vi sonorigas kaj la servistino venas.”

”Ho! Kiel belega kratago,” diris la alia infano, parolante mallaŭte al si mem.

”Ĝi ne estas kratago! Ĝi estas siringo.”

”Ho! kiel belega siringo. Ho, kara, kiel belega siringo.”

Ŝi malsuprentiris branĉon de floraĵoj kaj karesis ĝin per sia vango. Ĝi estis tre dolĉa, kaj ŝi ĝemspiris. Ŝi agadis tre ĉarme kaj fine ŝi sonorigis kaj la servistino venis.

”Ĉu mi povas vidi sinjorinon Lane?”

”Ne sinjorino Lane,” venis teruriga flustro. ”Lady Constance. Vi estas sinjorino Lane.”

”Ho! Ĉu Lady Constance estas hejme?”

”Ĉu vi bonvolas iri en la salonon?”

Ŝi kliniĝis kaj iris tra interspaco en la prunelbranĉoj. La blonda infano por momento ne rimarkis ŝin. Derompinte dornon ŝi estis absorbita kudrante brodaĵon tre delikate. Subite ŝi eklevis la rigardon kun plej perfekta ekkrio de ĝentila surprizo.

”Mia kara sinjorino Lane! Vi estas sinjorino Lane, ĉu ne?”

”Jes.”

”Kiel afable, ke vi venis. Ĉu vi ne volas sidiĝi? Mi sonorigos por teo. Vi devas esti laca. Ting-e-ling-e-ling! Ho! Jane, bonvolu tuj alporti teon. Dankon. Ho! Sidiĝu do, mi petas.”

”Kie mi sidu?” diris la bruna infano.

”Sur la tero, stulta!” flustris la blonda knabino. ”Ho! sidiĝu do sur la sofo, mi petas.”

”Mi ĵus admiris viajn belegajn kratagojn,” diris la bruna infano.

”La siringojn? Ho jes, ĉu vi ne ŝatus preni kelkajn?”

”Ho jes. Ĉu vi permesas?”

Ŝi komencis rampi denove tra la breĉo en la branĉoj. Tuj la blonda infano estis furioza.

”Vi ne rajtas fari tion, ĝis mi diros al vi,” ŝi flustris. ”Revenu kaj sidiĝu nun. Ho jes, kompreneble,” ŝi diris laŭte. ”Mi diros al la ĝardenisto, ke li detranĉu al vi kelkajn.”

La brunokula infano rerampis sub la arbon kaj sidiĝis. Ŝi aspektis tre humila kaj serioza kaj embarasita, kvazaŭ ŝi efektive estus en salono kaj ne scius, kion fari per la manoj. La blonda infano agadis superece, ne unu akcento aŭ gesto en malĝusta loko. La servistino alvenis kun teo kaj la blondulino diris kun perfekta afableco:

”Ĉu lakton kaj sukeron?”

La malhela infano estis okupiĝinta per kaŝitaj nodoj, la jupo levita, kaj ŝi ne aŭdis. La blondhara infano faris unu rigardon al ŝi kaj refurioziĝis.

”Mallevu vian veston,” ŝi flustris terurege. ”Vi mont-ras ĉion, kion vi havas.”

”Mi ne kulpas. Estas mia kalsoneto. Mi bezonas novan elastaĵon.”

”Sed vi ne rajtas fari tion. Ne en salono. Ni estas sinjorinoj!”

”Sed sinjorinoj faras.”

”Sinjorinoj *ne* faras! Sinjorinoj devas sidi kaj bele interparoli kaj bonkondukti. Kial vi ne povas agadi ĝuste?”

La brunokula infano cedis. Ŝi aspektis kvazaŭ ŝi estus tedita kaj konsternita de la afektado de la blonda infano kaj de la perspektivo esti sinjorino. Ŝi konstante rigardadis kun esprimo de kvieta sopiro al la prunelflorajoj, la blua ĉielo kaj la floroj aranĝitaj en la persikokatolo.

”Ĉu lakton kaj sukeron?” ripetis la blonda infano.

”Ho jes, bonvolu.”

Tie ne estis te-tasoj, sed la blonda infano kolektis aron da ŝtonoj por kukoj. La bruna infano sidis kun ŝtono en la mano. La alia prenis kukon inter la fingropintojn kaj faris elegantajn mordojn kaj maĉetis kun dolĉeca ride-to. Ŝi faris etajn konversaciojn ĝis perfekteco, kaj kiam ŝi trinkis, ŝi etendis la malgrandan fingron. Fine ŝi ekrimarkis, ke la malhela infano nek manĝas nek trinkas. Ŝi rigardis al ŝi kvazaŭ ŝi estus farinta milon da nepardonblaj pekoj kontraŭ la etiketo.

”Ĉu vi ne havas teon?” ŝi diris, glacie.

La brunokula infano ŝajnis iom skuita kaj tiam deklaris timeme:

”Mi ne volas ludi ĉi tiun ludon.”

”Kial vi ne volas ludi?”

La bruna infano ne respondis. Ĉia digno de la blonda infano tuj malaperis. Ŝi faris geston, kvazaŭ estus malfacile elporti ĉiujn mankojn de la pli juna infano.

”Nur ĉar vi ne scipovas agadi,” ŝi diris acide.

”Lasu nin eliri kaj kolekti violojn kaj esti realaj homoj.”

”Ni estas realaj homoj. Vi ludas tiel malsaĝe. Vi ne estas sufiĉe aĝa por kompreni.”

La brunokula infano aspektis akre malĝojigita. Subite ŝi faligis la ŝtonon kaj komencis elrampi senkonsole de sub la prunelarbo. La blonda infano alprenis novan, flatfavoran tonon.

”Estas facile,” ŝi diris. ”Vi devas nur ŝajnigi iomete kaj vi estas sinjorino. Ni povas rekomenci kaj vi povas esti dukino. Venu nur.”

La malhela infano rigardis returne por momento tre dubante, kvazaŭ estus tro multe por kredi, kaj poste foriris supren laŭ la deklivo. La alia infano nazblovis kaj reĵetis la kapon kun aroganta fiero kaj ekkriis:

”Vi ne pensu, ke vi povas reveni ĉi tien, nun kiam vi foriris.”

Sen respondo la brunokula infano foriris malantaŭ la kratagarboj kaj laŭ la heĝo ĉe la supro de la deklivo. Ŝi perdiĝis en mondo de merkuraloj kaj burĝonantaj kratagoj kaj palaj violoj. Ŝi trovis primolburĝonojn kaj fine

grupon da malfermiĝintaj primoloj kaj bedon de blankaj anemonoj. Parolante al si mem, ŝi kolektis florojn kaj foliojn kaj metis en siajn harojn, kiel la blonda infano estis farinta.

La blonda infano elrampis de sub la prunelarbo. Enŝovinte la jupon en sian palbluan kalsoneton ŝi staris rektiĝinte sur la piedpintoj, simile al balet-dancistino. Ŝi derompis prunelbranĉeton kaj tenis ĝin per ambaŭ manoj super sia kapo kaj tiam turniĝis sur la piedpintoj kaj faris altajn piedsvingojn kaj valsis majeste ronde ĉirkaŭ la prunelarbo. Tiam kaj iam ŝi ekkriis kaj kantis al si mem. Ŝi enigis teatran vibradon en sian voĉon kaj dancis ĉirkaŭ la prunelarbo laŭ la melodio, kiun ŝi faris, agadante perfekte.

Fine la brunhara infano revenis malsupren laŭ la deklivo. Ŝi vidis la blondan infanon dancanta kaj ŝi subite eksentis deziron ankaŭ mem danci. Ŝi staris ĉe la arbo kaj atendis. La blonda infano ekvidis ŝin.

”Vi ne rajtas veni ĉi tien!” ŝi mallice diris.

Spasmo de malĝojo trakuris la vizaĝon de la malhela infano. Ŝi turniĝis kaj malsupreniris la deklivon tre malrapide, kelkfoje haltante kaj rigardante malantaŭen kaj poste nevole forŝoviĝis. Fine, kun la primoloj kaj la sola anemono ankoraŭ brilantaj en siaj haroj, ŝi atingis la vojon kaj malrapide foriris kaj malaperis.

Kiam ŝi estis for, nenio restis por interrompi la gajecon de la dancanta infano, kun la floroj sur la tero kaj la prunelarbo verŝanta sian pluvon de ĉarmaj steloj.

**H. E. Bates**

*(A Flower Piece)*

*El la angla tradukis Birger Gerdman*



## Somera historio

**L**i antaŭenveturis sur la aŭtovojo kaj aŭdis klakadon de la radoj sur la betonaj slaboj. La pejzaĝo sangiĝis al senfinaj kampoj, la aŭtomobiloj iĝis malpli oftaj, rond- aŭ kvarangulaj. Jam de kvar tagoj li veturis. Lia griza aŭtomobileto estis veturinta laŭ duvojaj ŝoseoj preterpasante oftajn ŝargaŭtojn, poste venis land- kaj lingva limo, kvarvoja ŝoseo kun grandaj aliformaj aŭtomobiloj. Denove landlimo kun senfina paperumado kaj li nun pluen iris en la alsopiritan landon, mirante pro la hejmlandsimila grizeco de la domoj kaj la stranga odoro de lignito. En lia pasporto estis ŝia lasta letero kun foto: "Vi povas resti ĉe ni tiel longe kiel vi volas".

La picea arbaro maldensiĝis kaj aperis la unuaj domoj de la urbego.

Longe antaŭe li revis pri la alvenvojo kaj ne miris, kiam aperis longaj vicoj de pasintjarcentaj loĝdomoj intermiksitaj kun unuformaj pluretaĝaj domblokoj, nek kiam aperis longa rokoka avenuo kun kolonaj teretaĝoj. Delonge li trastudis la planon en la atlaso, kolektis ur-

bajn bildojn el alsenditaj revuoj. Delonge li revis pri tiu momento. Li deflankiĝis dekstren ĉe la granda placo antaŭ la turo, precize kiel li imagis, eniris en longan flankstraton, kun jarcentkomencaj loĝblokoj, kie li senpene parkis. Florpotaj balkonetoj, kie etendiĝis ultrakurtondaj antenoj estis la sola neatenditaĵo. "Jen la domo, li pensis, numero 6, tria etaĝo, ŝi devas atendi min". Li ŝlosis la aŭton kaj supreniris la ŝtuparon kun iom angora antaŭsento. El ŝiaj raraj leteroj travideblis nur sopiro al lia alveno kaj al lia lando.

"Kial, Deniza, vi ne iras hodiaŭ al la kulturligo, estas tago de via Esperanto-kurso, filinjo mia!" diris Lilja en fremdakcenta kaj gramatike erara landa lingvo.

"Kial do, mi ja ne bezonas scii tiun lingvon, li venos morgaŭ kaj bone scipovas nian landan lingvon, Esperanto ebligis al mi trovi lian adreson en gazeto, lia foto plaĉas al mi, li havas aŭton kaj estas bonhava, li interesiĝas pri nia praa lando, kial do? Mi preferas trejni atletikon?"

"Filinjo ankaŭ mi esperas, ke via revo efektiviĝos kaj helpos al vi tutkore," diris Lilja.

Lilja estis kvardekkvinjara sudlandanino. Ŝi vivis kun sia dudekjara filino Deniza kaj sia sepdekjara patrino en malnova duĉambra loĝejo apud la ĉefurba centro. Ŝi devenis el suda lando de tiu orienta tendaro, en la tiam

dividita Eŭropo. Kiel nun, pli ol nun, ŝia hejmlando al-tiris turistojn el la pli bonhavaj, sed sune malriĉaj nordaj landoj. Ŝi estis bela, kupra haŭto, nigra hararo kaj vivis en bela turisma centro. Ofte venis nordlandaj turistoj. Unu plaĉis al ŝi, li ĉiam ridetis, alparolis ŝin gaje kaj li estis fraŭlo. Ili rapide enamikiĝis. Li eĉ venis per aŭtomobileto. Lilja iris kun li tendumi sur la marbordo, ŝi ĝuis la veturadon, ili povis halti kie ajn, ne plu dependis de malpuraj homplenaj trajnoj, kie oni spiris la ŝviton de la kunvojaĝantoj. Malgraŭ agrablaj paŭzoj por manĝi aŭ trinki kafon, ili rapide atingis la maron. La aĉetpovo en lia lando estis duobla ol tiu de ŝia lando. Li estis inĝeniero kaj bone perlaboris. Dumtage ili kuŝis sur la orasando de la plaĝo, vespere ili seksumis ... Du semajnojn poste Lilja anoncis al sia familio, ke ili geedziĝos ... Unu monaton poste, ŝi vivis kun li en tiu norda lando kaj graviĝis ... La vivo estis finance pli facila, tamen ŝi ne plu sentis ŝin feliĉa. La gepatra lingvo plej mankis, al ŝi, ŝi tre malbone parolis la lokan lingvon, tial ke oficeja laboro ne eblis. Ŝi trovis laboron en fabriko, tedan sed bone pagatan. Kiam ŝi naskis filinon, Denizan, ŝi forgesis pri ĉiuj zorgoj. Longa estis la pagata patrino libertempo. Sed iom post iom zorgoj revenis ... Tiuj silentemaj homoj ... leviĝas matene ... iradas sen vorto al la laboro ... Kaj tiu ĉiama griza ĉielo ... Tiuj pluvaj tagoj dum monatoj ... De tiam ŝi pli kaj pli tristiĝis kaj riproĉis tion al sia edzo. Ili

apenaŭ interparolis. La edzo ĉiam malpli ofte aperis hejme, plej ofte nur por dormi, li pasigis vesperojn en la apuda bierejo, amikiĝis kun drinkuloj. Ŝi pli kaj pli havis nur unu intereson, sian filinon, kaj ŝia salajro transformiĝis al ludiloj kaj poste al ĉiuj deziroj de Deniza. Finfine ŝia edzo volis divorci. Ŝi jam estis al kutimiĝinta al la nova lando. Ŝi trovis oficejan laboron, certe pli agrablan. Ŝia patro mortis kaj ŝi venigis sian patrinon. Ŝiaj samlandanoj renkontiĝis en urba restoracio, ŝi ne plu estis vere sola. Sian filinon ŝi sendis ĉiusomere al siaj gefratoj al la praa lando. Ambaŭ vivis pense en la praa lando. Al Lilja lando de feliĉa junaĝo, al Deniza lando de ĉiama sunriĉa libertempo.

Kiel vi eble memoras, la tiama Eŭropo estis dividita en du socialajn kaj politikajn sistemojn, la orienta celis al sociala justeco, la okcidenta al individua libero kaj ili ĝismorte malamikiĝis. Vespere Deniza rigardadis la okcidentan televidon, kaj ĉiuj malfacilaĵoj de ŝia nuna vivo trovis kompenson en ĝiaj elsendoj. Ŝi multe interesiĝis pri populara okcidenta muziko, allogis ŝin la modoj, la multaj aŭtomobiloj, pri kiuj ŝi ĉiam revis ...

La avino de Deniza iam vizitis la landon de ŝia nova korespondanto kaj priskribis ĝin kiel suda, bluĉiela lando, kun sudaj vivmanieroj kaj alta vivnivelo. Kaj la lando iĝis revo de Deniza. El la lando de Deniza preskaŭ ne eblis vojaĝi okcidenten, kaj la okcidento iĝis pli kaj pli

reva. Ĉion okcidentan ŝi diigis, en trafikvicoj ŝi vidis nur kiel pruvo de alta aĉetpovo, en malriĉuloj kaj senlaboruloj ŝi vidis nur memkulpon de pigrujoj, ilustritaj klaĉrevuoj kaj -gazetoj estis por ŝi la plej leginda literaturo. Ŝi malŝatis sian realan hejmlandon, la longan ŝparadon por aĉeti aŭtomobilon, la severaspektan gazetaron, la socie kritikajn lirikistojn, ankaŭ la orientajn politikistojn ŝi abomenis. En ŝia menso brilis nur du revoj: lia nekonata lando kaj la suno de la patrino pralando. Kaj Deniza iom post iom forĝis projekton, elmigri al tiu suna mirakla lando kaj tie vivi. Sed elmigri ebligis nur unumaniere ... per edziniĝo ... .

Por edziniĝi oni devas havi ĉarmon, tion ŝi havis, ŝi ne dubis pri sia beleco ... Sed kiel konatiĝi kun okcidentlandano? En la grandega urbo ne facilis kontakti turistojn, kaj kontaktoj ĉiam estis supraĵaj. Iam ŝi vidis afiŝon: "Lernu Esperanton kaj havu amikojn en la tuta mondo". Kaj jen ŝi havis leterpartneron el la lando de siaj revoj ... Kaj jen li alvenos kaj parolos ŝian lingvon, estas samaĝa ... kaj ne povas esti alia ebleco, li iĝos ŝia edzo ...

El lia lando eblis vojaĝi orienten, sed malmultaj kuraĝis. Li jam vizitis tiun orientan landon. Li memoris afablajn homojn, kiuj lin akceptis en komforte ekipitaj loĝejoj. En malmulta trafiko li vidis saĝan preferon al la multaj etkostaj busoj kaj tramvoj kaj sufiĉon de malnova veturilo. Li admiris la plenan okupitecon kaj la maleston

de mizero, la senskandalan gazetaron, en kiu li vidis alvokon al racio, la socikritikajn lirikistojn, kiujn li konsideris pruvo de alta klerecnivelo. Li iom post iom forĝis projekton ... pli intime konatiĝi kun la lando kaj, kiu scias ... eble edziĝi kaj vivi tie alian vivon ...

La renkontiĝo estis iom alia ol li esperis. Deniza estis iom ĝenata, ŝajne ŝi ne kuraĝis diri ion, kaj Lilja ĉiam helpis sian filinon per rimarkigoj, kvazaŭ ili ambaŭ estus preparintaj direndaĵojn.

Poste ili vizitis la centran urbon, la grandajn avenuojn kun multaj vendejoj, haltis en restoracio por tagmanĝi kaj revenis hejmen.

Deniza tuj ŝaltis la radioricevilon por aŭskulti el okcidenta stacio muzikajn furoraĵojn, kiujn li hejme zorge evitis. Ŝi konis la nomojn de ĉiuj kantistoj, komentis iliajn oftajn ge- kaj eksedziĝojn, iliajn supozatajn fortunojn kun nekaŝita envio, precize tion, kion li opiniis stultiga. Okulfrapis lin, ke neniu el ŝiaj libroj interesas lin. Biografioj de kantistoj kaj rokgrupoj, ĉiuj okcidentaj, amromanoj, stultige rozkoloraj.

Vespere ŝi enŝaltis la televidilon kaj sen demandi, kion li volas spekti, ŝaltis la okcidentan programon. Venis informoj. Kiel tiam oftis, la orientaj-okcidentaj rilatoj akriĝis. Ŝi ĝojis pro tio, ŝi akompanis ĉiun rimarkon kritikante sian landon per eta ĝojbleka frazo. Ŝi eĉ trovis insultajn vortojn, kiam aperis orientaj ŝtatestroj ...

Li volis rigardi la orientan televidon, sed ŝi tion kontraŭstaris, kun pravigo, ke jam ŝi satiĝis je tio, kaj li volis scii, kio estas tiu "tio" kaj des pli sopiris al ĝi. Li dormis sur la sofo, kaj komprenis nur poste, kial Lilja ekdormis sur la apogseĝo ... Estis nur unu dormoĉambro.

La venontan tagon li dormis sola, en unuĉambra loĝejo je kvar haltejoj de tie, ĝi estis Lilja-a, malplena sed la lupago estis nur simbola, ŝi konservis ĝin senelektra, al li sufiĉis kandelo. Verdire, li pli emis resti en la nova kvartalo ol reveni al Deniza, strange distanca. Kiam ŝi forestis, Lilja diris al li: "Deniza demandis min, kial vi ankoraŭ ne prenis ŝian brakon kaj ne kisis ŝin." Kvankam nevole, li tiam komprenis la kialon de la invito, kaj miris, ĉar li sentis nenian emon al ŝi.

Li vespere, kiel eble plej frue iris al la "alia loĝejo", pli por fuĝi antaŭ Deniza ol pro vera dormemo. Li promenis en la alia kvartalo, haltis en trinkejoj, ne tiom por trinki kiom por konatiĝi kun homoj, kio vere, kvankam supraĵe, facilis. Tage li pretekstis serĉadon de apartaj libroj por longe foresti kaj vagadi sola tra la urbo ...

Liaj rilatoj kun Deniza pli kaj pli malboniĝis, li nenion riproĉis al ŝi, li ja estis gasto, sed pli kaj pli evitis paroli kun ŝi, fumadis pretekste por iradi sur la balkonon, kaj silente li akceptis ŝian riproĉon: "Ĉu vi ĉiam tiel multe fumas?"

La politika situacio en la najbara lando pli kaj pli akriĝis, tio sentebliis jam el la gazetoj, pli teruraj estis la anoncoj de la okcidenta televido, kiun Deniza ĉiuvespere ĝojbleke spektis, de la informoj ĝis la fina himno. Ili parolis pri fermita landlimo, militdanĝero, ultimato. Sed li ne volis kredi je tio ...

Kaj jen Deniza revis pli kaj pli pri aŭto kaj nepre volis stiri aŭtomobilon. Ili veturis por promeni en la kamparo, ŝi insistis por stiri. Li fine cedis ... haltis sur flanka tervojo ... tenis enmane la manbremson kaj indikis al ŝi kiel stiri ... incitis ŝin al malrapido. Sed ŝi, nesperte, subite ellasis la bremspedalon premante tro forte la gasan. La aŭto eksaltis brutale, deflankiĝis kaj, se ne li estus rapide stirturninte kaj manbremsinta, ili estus koliziintaj kontraŭ palisado.

”Vi ne konscias,” li diris, ”en kian ĝenon min metus akcidento vialanda, mi avertis vin, ke vi apenaŭ premu!”

Ŝia vizaĝo faltiĝis, kvazaŭ post doloro de serpenta mordo, ŝi klopodis kaŝi internan furiozecon. Kiam li stiris reen hejmen, ŝi silentis konsterniĝante pri sia nekapableco stiri, mutigata pro interna rabio ...

”Mi eraris pri via aspekto vidante vian foton,” ŝi diris poste kun videbla intenco vundi lin ...

Venis nova mateno. Stranga angora sento kaptis lin. ”Ne, mi neniam povus kunvivi kun ŝi”, li pensis. Li aĉetis la gazeton, sur la unua paĝo simpla agenteja komu-



niko: "Ĉiuj pakttrupoj el nia landaro eniris en nian najbarlandon kaj tie restos, tiom longe, kiom la paca disvolviĝo estos minacata". Li vane serĉis klarigojn, ili malrestis. La pasantoj grizmiene legis la gazetojn. Li tiam decidis forveturi. Li pakis siajn aĵojn kaj veturis al Lilja por adiaŭi. Deniza malestis, ŝi trejnis kiel ĉiumatene atletikon ... Li anoncis al Lilja, ke li forveturos. Ŝia vizaĝo krispiĝis, ŝi surprenis doloran esprimon, ĝi estis bela, kupra, iom azia, tion li unuafoje rimarkis.

Ŝi klopodis ŝanĝi lian decidon, ŝi petegis lin ... diris ke ŝia filino ankoraŭ hieraŭ petis lin sciigi, ke ŝi amas lin. Li restis malcedema, li ne povis cedi, li neniam povus vivi kun Deniza, li ne plu povis resti en tiu lando ...

Lilja sekvis lin al la aŭto, ŝi daŭre petegis lin: "Ne foriru, ne estas tro malfrue, ĉio pliboniĝos, vi povos ĉion fari, kion vi volos, nur restu ... restu kun Deniza ... Vi povos spekti orientan televidon, eĉ labori ĉi tie, ne gravas, ĉion tion Deniza akceptos ... Nur restu kun ŝi, nur restu." ... Ŝi eniris en la aŭton ... li startis, ŝi ne volis eliri ... ŝi petegis ploregante ... Ŝia bela vizaĝo aspektis belega sub la larmoj ... Kiel domaĝe li pensis ... kun ŝi eblus vivi, sed ŝi ne povas ekzisti sen filino, ŝia sola havaĵo ... Li traveturis la unuajn avenuojn, haltante ĉe parkejoj kaj semaforoj, proponante, ke ŝi eliru ... sed ŝi daŭre petegis lin ... petegis lin ...

Finfine ili atingis la lastan stacidomon de la aera metroo. Poste ne plu eblos reveni. Li haltis ... ŝi rezignis. Plu petegante ŝi eliris. Li ne rigardis ŝin ... Ŝi fine eliris ... Li rimarkis, ke ŝi forgesis sian mansakon en la aŭto, enmanigis ĝin al ŝi, ŝia vizaĝo imponis al li ... Doloro aldonis solemnan, preskaŭ majestatan esprimon ... Li fermis la pordon kaj hezitis starti, kvazaŭ lia piedo ne plu havis forton premi gaspedalon ... En la retrospegulo, ŝia vizaĝo rezigne kliniĝis al la tero kaj tuj malaperis.

Li denove antaŭenveturis sur la aŭtovojo, denove aŭdiĝis klakado de la radoj sur la betonaj slaboj. La urbo ŝanĝiĝis al senfinaj kampoj, je ĉiu aŭtovojo eliro staris policano ... Li tiam konsciis, ke li jam forlasis la landon kaj ke ne eblas reveno ...

Jaroj pasis. Li profesie revenis en la landon. Li hazarde preteriris al la strato de Deniza. Li ne povis elteni, li volis vidi. Ŝia nomo staris senŝanĝa ĉe la pordo. Li sonoris. La avino malfermis kaj flustris: "ne ĉi tien" ... Li forturnis sin kaj foriris ekkonsciante, ke nia ekzisto plenas je iluzioj, ke malfacile eblas forigi ilin, ĉar estas tro dolore rigardi fronte al la vivo ...

**Robert Pontnau**

## Malfeliĉo

**S**ofio Petrovna, edzino de notario Lubjancev, bela, juna virino, ĉirkaŭ dudek kvin jaroj aĝa, malrapide iris en arbara trahakaĵo kun sia somerloĝeja najbaro, advokato Iljin. Estis la kvina horo vespere. Super la trahakaĵo flugpendis blankaj lanugsimilaj nuboj; tra ili elrigardis kelkaj pecetoj de helblua ĉielo. La nuboj ne moviĝis, kvazaŭ la altaj, maljunaj pinoj haltigus ilin. Estis silente kaj varme.

Malproksime la trahakaĵon trais malalta fervoja digo, sur kiu promenis garda soldato. Tuj post la digo staris blanka seskupa preĝejo kun rusta tegmento.

—Mi ne esperis vin renkonti ĉi tie, — diris Sofio Petrovna, rigardante teren, kaj tuŝante per ombrela pinto terkuŝantajn foliojn, — kaj nun mi estas ĝoja, ke ni renkontiĝis. Mi bezonas paroli kun vi serioze kaj definitive. Mi petas vin, Johano Miĥajloviĉ, se vi efektive ŝatas kaj estimas min, ĉesu viajn persekutojn! Vi iras post mi kiel ombro, ĉiam rigardas min malbonolkule, parolas pri

amo, skribas strangajn leterojn kaj ... kaj mi ne scias, kiam tio ĉi finiĝos! Nu, ĉu ĝi estas necesa, mia dio?

Iljin silentis, Sofio Petrovna iris kelkajn paŝojn kaj daŭrigis:

—Kaj tia forta ŝanĝo okazis dum du-tri semajnoj, post kvinjara konateco. Tio ĉi saĝnas al mi stranga, Johano Miĥajloviĉ.

Sofio Petrovna deflanke ekrigardis la najbaron. Li atente, fermetante la okulojn, rigardis la lanugsimilajn nubojn. La esprimo de lia vizaĝo estis nekontenta, kaprica kaj distrita, kiel ĉe homo, kiu suferas kaj samtempe estas devigata aŭskulti bagatelon.

—Estas mirinde, ke vi mem tion ĉi ne povas kompreni! — daŭrigis Lubjanceva, levetante la ŝultrojn. — Komprenu, ke vi komencas ne tute bonan ludon ... Mi havas edzon, amas kaj estimas lin ... Mi havas filinon ... Ĉu efektive estas, ke por vi tio ĉi estas malgravaĵo? Krome vi, kiel mia malnova amiko, konas mian opinion pri familio ... pri la fundamento de familia vivo .....

Iljin nekontente ekĝemetis kaj diris:

—Fundamento de familia vivo ... Ho, dio!

—Jes, jes ... Mi amas la edzon, estimas kaj certe ŝatas la trankvilecon de la familio. Mi pli volonte dezirus esti mortigita, ol kaŭzi malfeliĉon al Andreo kaj al lia filino ... Kaj mi petas vin, Johano Miĥajloviĉ, lasu min trankvila. Ni estu, kiel antaŭe, bonaj amikoj, kaj la ĝemetojn,

kiuj ne konvenas al vi, lasu. Nu, estas decidite kaj finite! Neniun vorton plu pri tio ĉi. Ni parolu pri alio.

Sofio Petrovna ree deflanke rigardis la vizaĝon de Iljin. Iljin rigardis supren, estis pala kaj malkontente mordetis la tremantajn lipojn. Lubjanceva ne komprenis la kaŭzon de lia malkontento, sed lia palo kortuŝis ŝin.

—Ne koleru, ni estu amikoj ... — ŝi diris karese. — Ĉu vi konsentas? Jen estas mia mano.

Iljin prenis ŝian malgrandan, molan manon per ambaŭ manoj, premetis ĝin kaj malrapide levis al la lipoj.

—Mi ne estas gimnazio, — murmuris li. — Min neniom logas amikeco kun amata virino.

—Sufiĉe, sufiĉe! Estas decidite kaj finite. Ni venis al benko, ni sidiĝu ...

La animon de Sofio Petrovna plenigis agrabla sento de ripozo: la plej malfacila kaj ĝena estis jam dirita, la maltrankviliganta demando estas solvita kaj finita. Nun ŝi jam povis libere spiri kaj rigardi Iljinon rekte en la vizaĝon. Ŝi rigardis lin, kaj egoista sento de supereco de amata virino kontraŭ enamiĝinto agrable karesis ŝin. Al ŝi plaĉis, ke tiu ĉi forta, granda viro kun brava vizaĝo kaj kun granda nigra barbo, saĝa, klera kaj, kiel oni diras, talenta, obeeme sidiĝis apud ŝi kaj mallevis la kapon. Du-tri minutojn ili sidis silente.

—Nenio ankoraŭ estas decidita kaj finita ...— diris Iljin. — Vi kvazaŭ el alfabeto libro legas al mi: "Mi amas

kaj estimas la edzon ... fundamento de familio ...” Tion ĉi mi konas sen vi kaj povas eĉ diri al vi pli multe. Sincere kaj honeste mi diris al vi, ke tiun ĉi mian konduton mi opinias krima kaj senmorala. Kion pli mi povus diri? Sed kial diri tion, kio estas al ĉiuj konata? Anstataŭ nutri najtingalon per vanaj vortoj, pli bone estus, se vi instruus min: kion mi devas fari?

—Mi jam diris al vi: forveturu!

—Mi jam — vi tion ĉi bone scias — forveturis kvinfoje kaj ĉiam revenis de mezvojo! Mi povas montri al vi la biletojn, — ili ĉiuj estas konservitaj. Mankas volo por forkuri de vi! Mi batalas, forte batalas, sed al kiu diablo mi taŭgas, se mankas ĉe mi decidemo, se mi estas malforta, malkuraĝa! Mi ne povas batali kontraŭ la naturo. Ĉu vi komprenas? Mi ne povas! Mi forkuras de tie ĉi, kaj ĝi tenas min je la baskoj. Abomena, honta malforteco!

Iljin fariĝis ruĝa, leviĝis kaj ekiris apud la benko.

—Kiel hundo mi koleras! — li murmuris, pugne premante la manojn. — Malamegas min mem kaj malestimas! Mia dio, kiel malĉasta bubegaĉo mi amindumas fremdan edzinon, skribas idiotajn leterojn, malgloras ...

Iljin mane kaptis la kapon, ekĝemis kaj sidiĝis.

—Kaj krome via malsincereco! — li diris riproĉe. — Se vi malaprobas mian konduton, kial vi venis ĉi tien? Kio logis vin tien ĉi? En miaj leteroj mi petas de vi nur kategorian, sinceran respondon jes aŭ ne, kaj vi anstataŭ sin-

cera respondo tendencas ĉiutage "hazarde" renkontiĝi kun mi, kaj regalas min per sentencoj el alfabetaj libro!

Lubjanceva subite ektimis kaj ruĝo kovris ŝin. ^Ŝin subite atakis la sento, kiu aperas ĉe bonkonduktaj virinoj, kiam oni neatendite ekvidas ilin nekonvene vestitaj.

—Vi kvazaŭ suspektas, ke mi ludas ... — ŝi diris. — Mi ĉiam sincere respondis al vi kaj ... kaj hodiaŭ mi petis vin!

—Ĉu oni petas en similaj cirkonstancoj? Se vi estus dirinta: "Iru for!" mi jam delonge ne estus tie ĉi, sed vi ne diris al mi tion. Neniam vi respondis al mi sincere. Stranga estas la hezito! Vere estas, ke vi ludas kun mi, aŭ ...

Iljin ne finis paroli kaj apogis la kapon per la manoj. Sofio Petrovna komencis rememori sian vivon de la komenco ĝis la fino. Ŝi memoris, ke ŝi ĉiam ne nur age, sed ankaŭ en siaj kaŝitaj pensoj estis kontraŭ la amindumado de Iljin, sed samtempe ŝi sentis, ke en la vortoj de la advokato estas parto da vero. Ne sciante, kia estas tiu vero, ŝi, malgraŭ la penado, nenion trovis por respondi al la plendo de Iljin. Ne estis konvene silenti kaj ŝi diris, levetante la ŝultrojn:

—Kaj mi krome estas kulpa.

—Mi ne opinias vin kulpa pro nesincereco ... — diris Iljin. — Via nesincereco estas komprenebla kaj natura.

Se ĉiuj homoj interkonsentus kaj subite fariĝus sinceraj, ĉio pereus ĉe ili.

Neniu filozofio okupis la pensojn de Sofio Petrovna, sed ŝi estis ĝoja ŝanĝi la interparolon kaj demandis:

—Kial?

—Ĉar estas sinceraj nur sovaĝuloj kaj bestoj, se civilizacio enportis en la vivon tian bezonaĵon, kiel ekzemple virina virto, tie ĉi sincereco estas nekonvena ...

Iljin kolerete pikis sablon per bastono. Lubjanceva aŭskultis lin, multon ŝi ne komprenis, sed lia parolo plaĉis al ŝi. Al ŝi antaŭ ĉio plaĉis, ke kun ŝi, kun ordinara virino, talenta homo parolas pri "saĝaj aferoj"; poste tre plaĉis al ŝi rigardi, kiel moviĝas la pala, viva kaj ankoraŭ kolereta, juna vizaĝo. Multon ŝi ne komprenis, sed al ŝi estis evidenta tiu ĉi bela kuraĝo de moderna homo, kun kiu ĝi ne meditante kaj neniom hezitante, decidus gravajn demandojn kaj faras definitivajn konkludojn.

Ŝi subite rimarkis, ke ŝi lin admiras, kaj ektimis.

—Pardonu min, sed mi ne komprenas, — ŝi rapidis diri, — kial vi komencis paroli pri malsincereco? Mi ripetas ankoraŭ unufoje mian peton: estu bona amiko, lasu min trankvila! Mi sincere petas!

—Bone, mi ankoraŭ batalos! — diris Iljin. — Mi estas ĝoja plenumi ... — Sed mi dubas, ke mia provo sukcesos. Aŭ kuglon mi sendos en mian frunton, aŭ ... ekdrinkos plej malsaĝe. Ne estos bone al mi! Ĉio havas sian limon,



ankaŭ batalo kun la naturo. Diru kiel oni povas batali kun frenezo? Se oni trinkos vinon, kiel oni subigos la ebrion? Kion mi povas fari, se via portreto alkreskis mian animon kaj trudeme, tage kaj nokte, staras antaŭ miaj okuloj, kiel dum ĉi tiu momento, jene staras tiu ĉi pino? Nu, diru, kian heroaĵon mi devas fari por liberiĝi de tiu ĉi malagraba, malfeliĉa stato, kiam ĉiuj miaj pensoj, deziroj, songoj apartenas ne al mi, sed al iu demono, kiu sidiĝis en min? Mi amas vin, mi amas ĝis tia grado, ke mi perdis mian vojon, ĵetis la aferon kaj la homojn proksimajn, forgesis mian dion! Neniam en la vivo mi amis tiel!

Sofio Petrovna ne atendis tian ŝanĝon, ŝi iom foriĝis de li kaj time rigardis lian vizaĝon. En liaj okuloj aperis larmoj, la lipoj tremetis kaj la esprimo de la tuta vizaĝo estis malsata kaj peteganta.

—Mi amas vin! — li murmuris, proksimigante siajn okulojn al ŝiaj grandaj, timantaj okuloj. — Vi estas tiel admirinda! Mi suferas ĉi tiun minuton, sed, mi ĵuras, la tutan vivon mi estus sidanta kaj rigardanta tiel, suferante kaj rigardante viajn okulojn. Sed ... ne parolu, mi petas vin!

En konsterno, ŝi ne aŭskultis liajn vortojn; ial nun, en tiu ĉi danĝera momento, kiam ŝiaj genuoj agrable kun-tiriĝadis, kiel en varma akvo, ŝi kun iu malico serĉis sencon en siaj sentoj, ŝi koleris, ke ŝin tutan anstataŭ pro-

testanta virto, plenigas senforteco, apatio kaj malplene-  
co, kiel ebriinton, al kiu ĉiu maro ĝis genuo ŝajnas esti  
profunda; nur en la profundo de la animo iu malice di-  
ris: "Kial vi ne foriras? Ĉu tiel ĉio devas esti? Jes?"

Serĉante en si sencon, ŝi ne komprenis, kial ŝi ne for-  
tiris la manon, al kiu kvazaŭ hirudo kisaliĝis Iljin, kaj kial  
ŝi rapidis samtempe kun Iljin rigardi dekstren kaj mal-  
dekstren, ĉu iu rigardas? La pinoj kaj la nuboj staris sen-  
move kaj rigardis severe, kiel maljunaj servistoj, kiuj vi-  
das la petolaĵon, sed ili promone promesis ne denunci la  
estron. La garda soldato staris kvazaŭ kolono kaj ŝajnis  
rigardi la benkon.

"Li rigardu!" — pensis Sofio Petrovna.

—Sed ... sed aŭskultu! — ŝi diris malespere. — Al kio  
tio ĉi kondukos? Kio estos poste?

—Mi ne scias, mi ne scias ... — murmuretis li, sving-  
ante per la mano kontraŭ malagrablaj demandoj.

Eksonis raŭka, tremanta fajfo de lokomotivo. La frem-  
da, malvarma sono de ordinara vivo devigis ŝin ektremi.

—Mi ne havas tempon ... urĝas la tempo iri! — ŝi di-  
ris, rapide leviĝante. — La vagonaro venas ... Andreo ve-  
turas! Li bezonas tagmanĝi! "

Sofio Petrovna turnis sin al la fervojo, En la komenco  
malrapide elrampis lokomotivo, poste aperis vagonoj. Ĝi  
estis ne pasaĝera vagonaro, kiel opiniis Sofio Petrovna,  
sed karga. Longvice, unu post la alia, kiel la tagoj de la

homa vivo, ekaperis sur la blanka koloro de la preĝejo la vagonoj kaj, ŝajnis, finon ili ne havos!

Sed jen post longa tempo la vagonaro finiĝis kaj la lasta vagono kun lanternoj kaj konduktoro malaperis post la arboj. Sofio Petrovna subite leviĝis kaj nerigardante Iljinon, rapide ekiris returnen en la trahakaĵo. Ŝi jam regis sin. Ruĝa pro honto, ofendo ne de Iljin, ne, sed de sia propra maldecidemo, de sia senhonteco, kun kiu ŝi, bonmorala kaj pura virino, permesis al fremda homo ĉirkaŭpreni ŝiajn genuojn, ŝi nun nur pri unu sola afero pensis, veni plej rapide hejmen, al la familio. La advokato apenaŭ povis sekvi ŝin. Sin turnante de la advokato sur mallarĝan vojeton, ŝi rigardis malantaŭen al Iljin tiel rapide, ke ŝi ekvidis nur sablon sur liaj genuoj, kaj eksvingis al li per la mano, ke li ne sekvu, ŝin.

Veninte hejmen, Sofio kelkajn minutojn staris senmove en sia ĉambro kaj rigardis la fenestron, la skribotablon ...

—Abomenulino! — ŝi insultis sin. — Abomenulino!

Malgraŭ si, ŝi detale, nenion kaŝante, rememoris, ke ŝi estas kontraŭ la konduto de Iljin, sed samtempe io ŝin tiras interkompreniĝi kun li; ŝi rememoris, ke ŝi, kiam li genuis ĉe ŝiaj piedoj, sentis neordinaran ĝuon. Ĉion ŝi rememoris, sen kompatato al si, kaj nun, sufokiĝante pro honto, ŝi estus ĝoja sin vangofrapadi.

”Malfeliĉa Andreo, — ŝi pensis, penante ĉe la rememoro pri la edzo fari karesan mienon. — Vanjo, mia malfeliĉa filineto, ŝi ne scias, kian patrinon ŝi havas! Pardonu min, karuloj! Mi amas vin tre ... tre!”

Kaj dezirante pruvi al si mem, ke ŝi estas ankoraŭ bona edzino kaj patrino, ke estas ankoraŭ sendifekta ŝia ”fundamento”, pri kiu ŝi parolis al Iljin, Sofio rapide eniris la kuirejon kaj riproĉis tie la servistinon, ke ŝi ne pretigis la tablon por la tagmanĝo de Andreo. Ŝi penis prezenti al si la lacigitan kaj malsatan mienon de la edzo, voĉe kompatis lin kaj mem preparis la tablon por li, kion antaŭe ŝi neniam faris. Poste ŝi trovis sian filineton Vanjon, levis ŝin sur siajn brakojn kaj karese ĉirkaŭprenis; la knabineto ŝajnis al ŝi peza kaj malvarma, sed ŝi ne deziris konfesi al si pri tio kaj komencis paroli kun ŝi pri tio, kiel honesta kaj bona estas ŝia paĉjo.

Sed, kiam alveturis la edzo, ŝi apenaŭ salutis lin. La invado de falsaj sentoj jam pasis, nenion pruvinte al ŝi, sed nur incitinte kaj koleriginte ŝin per sia nenatureco. Ŝi sidis ĉe la fenestro, suferis kaj koleris. Nur en malfeliĉo homo povas kompreni, kiel malfacile estas regi siajn sentojn kaj pasiojn. Sofio poste rakontis, ke ŝi sentis sin implikita forte, ke estis tiel malfacile liberiĝi, kiel kalkuli rapide flugantajn paserojn. Pro tio, ekzemple, ke ŝi ne estis ĝoja pro la veno de la edzo, kaj ke al ŝi ne pla-

ĉis, kiel li kondutas ĉe la tablo, ŝi subite konkludis, ke ŝi komencas malami la edzon.

Andreo, malfortigita de malsato kaj laciĝo, atendante la venon de supo, atakis kolbason kaj manĝis ĝin avide, laŭte maĉante kaj movante la tempiojn.

”Bona dio,” pensis Sofio, ”mi amas lin kaj estimas, sed ... kial li tiel abomene maĉas?”

En la pensoj estis ne malpli granda malordo ol en la sentoj. Sofio, kiel ĉiuj homoj nespertaj batali kontraŭ malagrablaj pensoj, penis per la tuta forto ne pensi pri sia malfeliĉo, kaj ju pli ŝi penis, des pli reliefe aperis en ŝia imago Iljin, la sablo sur liaj genuoj, la lanugaj nuboj, la vagonaro ...

”Kaj kial mi, malsaĝulino, iris hodiaŭ?” sufere pensis ŝi. ”Kaj ĉu efektive mi estas tia, ke mi ne povas garantii pri mi mem?”

La timo havas grandajn okulojn. Kiam Andreo estis finanta la tagmanĝon, ŝi jam estis decidinta rakonti ĉion al la edzo kaj forkuri de la danĝero!

—Mi bezonas serioze paroli kun vi, Andreo. — ŝi komencis post la tagmanĝo, kiam ŝia edzo estis demetanta la redingoton kaj la botojn por kusiĝi kaj ripozi.

—Nu?

—Ni forveturu de ĉi tie!

—Kien? Estas ankoraŭ frue por veturi en la urbon.

—Ne, vojaĝi aŭ ion similan ...

—Vojaĝi ... — murmuris la notario, sin etendante. — Mi mem pri tio revas, sed de kie preni monon, kaj kiu estos anstataŭ mi en la kontoro?

Kaj, meditante iom, li diris:

—Efektive, vi enuas. Veturu mem, se vi deziras!

Sofio konsentis, sed tuj konsideris, ke Iljin ĝojos pri la okazo kaj veturos kun ŝi en la sama vagonaro, en la sama vagono ... Ŝi pensis kaj rigardis sian edzon, satan, sed ankoraŭ lacigitan. Ial ŝia rigardo haltis sur liaj piedoj, miniaturaj, preskaŭ virinaj, vestitaj per striitaj ŝtrumpoj; sur la finoj de la ambaŭ ŝtrumpoj pendis fadenetoj ...

Malantaŭ la mallevita kurteno sin batis al la fenestro burdo. Sofio rigardis la fadenetojn, aŭskultis la burdon kaj imagis al si, kie ŝi veturas ... Kontraŭe tagon kaj nokton sidas Iljin, ne deturnante de ŝi la okulojn, kolera pro sia malforteco kaj pala pro anima doloro. Li nomas sin malĉasta knabegaĉo, riproĉas sin, ŝiras la harojn sur sia kapo; sed kiam venas krepusko kaj kaptante oportunan okazon, kiam la pasaĝeroj ekdormas aŭ eliras stacion, li falas genue antaŭ ŝi, kial tiam ĉe la benko ...

Ŝi subite komprenis, ke ŝi revas ...

—Aŭskultu, mi ne veturos sola! — ŝi diris. — Vi devas veturi kun mi!

—Fantazio, Sonjo! — bedaŭre diris Lubjancev. — Oni devas esti serioza kaj deziri nur, kio estas ebla.

”Vi kunveturos, kiam vi sciigos!” pensis Sofio.

Kiam ŝi estis decidinta veturi, ŝi sentis sin sendanĝera; ŝiaj pensoj iom post iom ricevis ordon, ŝi fariĝis gaja kaj permesis al si pensi pri ĉio; kion ajn ŝi pensos kaj revos, la forveturo estas neevitebla!

Dum la edzo dormis iom post iom vesperiĝis ... Ŝi sidis en la gastoĉambro kaj ludis fortepianon, multhoma vespera promenado, sonoj de muziko, sed, pli multe la penso, ke ŝi estas saĝa, ke ŝi venkis la malfeliĉon, definitive faris ŝin gaja. "Alia, virino," diris al ŝi la trankvila konscienco, "certe ne estus kontraŭstarinta kaj ŝi preskaŭ forbrulus pro honto, sed nun ŝi kuras de la danĝero, kiu eble ne ekzistas!" Tiel kortuŝis ŝin ŝia virto kaj decidemo, ke ŝi eĉ trifoje rigardis sin en spegulo.

Kiam mallumiĝis, venis gastoj. La viroj sidiĝis en la manĝoĉambro por ludi kartojn, la virinoj okupis la gastoĉambron kaj la terason. Pli poste venis Iljin. Li estis malgaja, malbonhumora kaj kvazaŭ malsana. Kiel li sidiĝis en angulo de la kanapo, tiel li estis sidanta la tutan vesperon. Ordinare gaja kaj parolema, li ĉi tiun fojon la tutan tempon silentis, sulkigante la brovojn. Kiam li respondis ies demandon, li pene ridetis nur per la supra lipo kaj respondis mallonge, malafable. Kelkfoje li diris spritaĵon, sed la spritaĵoj estis kruelaj kaj arogantaj. Al Sofio ŝajnis, ke li alproksimiĝas al histerio. Nur nun, sidante ĉe fortepiano, ŝi por la unua fojo klare konsciis, ke tiu ĉi malfeliĉa homo efektive suferas, ke li estas anime

malsana pro ŝi. Li pereigas la plej belajn tagojn de sia kariero kaj juneco, malŝparas la lastan monon por somerloĝejo, forlasis sian patrinon kaj fratinojn, sed ĉefe estas, ke li vane batalas kun si mem. Pro ordinara kompatemo oni devas agi kun li serioze ...

Ŝi konsciis tion ĉi klare, ĝis doloro en la koro, kaj se — en tiu ĉi tempo, ŝi venus al Iljin kaj dirus al li "ne!", en ŝia voĉo estus forto, kiun malfacile oni povus malobei. Sed ŝi ne diris, eĉ ne pensis pri tio ... La egoismo de ŝia naturo neniam montris sin tiel forte, kiel en tiu ĉi vespero. Ŝi konsciis, ke Iljin estas malfeliĉa kaj sidas sur la kanapo, kiel sur pingloj, ŝi ĉagreniĝis pri li, kaj samtempe la ĉeesto de la homo, kiu ŝin amas ĝis sufero, plenigis ŝian animon per triumfo, per sento de sia forto. Ŝi sentis sian junecon, belecon, decidemon kaj, ĉar ŝi estas decidinta forveturi, ŝi ne plu pensis pri siaj agoj. Ŝi koketis, senĉese ridis, kantis kun neordinara sento kaj inspiro, ĉio ŝajnis al ŝi amuza kaj ridinda. Ridinda ŝajnis al ŝi la okazo ĉe la benko, la garda soldato. Ridindaj ŝajnis al ŝi la gastoj, la ofendaj spritaĵoj de Iljin, la pinglo ĉe lia kravato, kiun ŝi antaŭe ne vidis. La pinglo prezentis ruĝan serpenton kun diamantaj okuloj ; tiel ridinda ŝajnis al ŝi la serpento, ke ŝi volonte ĝin kisu.

Sofio kantis romanojn nerve, kun ia duonebria militemo kaj, kvazaŭ aludante ies malfeliĉon, ŝi elektis malgajajn, melankoliajn, kiuj parolis pri perditaj esperoj, pri



pasinto, pri maljuneco ... ”Kaj maljuneco venas ĉiam pli proksime pli proksime ...” — ŝi kantis. Kaj kiamaniere ŝin rilatis maljuneco?

”Ŝajnas, ke mi estas neordinara ...” iafoje ŝi pensis dum ridado kaj kantado.

La gastoj foriris je la dekdua horo. Laste foriris Iljin. Ĉe Sofio restis ankoraŭ militemo por lin akompani ĝis la lasta ŝtupo de la teraso. Ŝi deziris diri al li, ke ŝi forveturos kun la edzo, kaj rigardi, kiel efikos la sciigo.

La luno kaŝis sin post la nuboj sed estis tiel lume, ke Sofio vidis, kiel la vento movas la faldojn de lia palto kaj la drapiraĵon de la pordo, ŝi vidis ankaŭ, kiel pala estas Iljin kaj kiel li, penante ekrideti, kripligis la supran lipon.

—Sonjo, Sofinjo ... mia kara virino! — li ekmurmuris, malhelpante ŝin paroli. — Kara mia, bona!

En la paroksismo de karesemo li diris al ŝi la plej karesajn vortojn, kaj jam diris al ŝi ci, kiel al edzino, aŭ amatino. Subite li ĉirkaŭprenis ŝin per unu brako ĉirkaŭ la talio kaj per la alia li prenis ŝin ĉe kubuto.

—Kara, ĉarma mia ... — li ekmurmuris, kisante la kolon ĉe la nuko, — estu sincera, venu hodiaŭ al mi.

Ŝi elglitis el lia ĉirkaŭpreno kaj levis la kapon, por eksplodi per indigno, sed la indigno ne aperis kaj ŝia tuta virto sufiĉis nur por diri al li frazon, kiun diras en similaj cirkonstancoj ĉiuj ordinaraĵoj virinoj:

—Ĉu vi freneziĝis?

—Ni iru! — daŭrigis Iljin, — tuj, kaj tie, ĉe la benko, mi konvinkiĝis, ke vi Sonjo, ankaŭ estas malforta kiel mi ... Ne evitos ankaŭ vi la malfeliĉon! Vi amas min kaj nun vane marĉandas kun via konscienco.

Vidante, ke ŝi foriras, li kaptis ŝin je la punta maniko kaj diris:

—Se ne hodiaŭ, tiam morgaŭ, sed oni devas cedi! Kial do la prokrasto? Mia kara, amata Sonjo, la verdikto estas farita, kial estu prokrastata ĝia plenumo? Pro kio trompi sin?

Sofio liberigis sin de li kaj forkuris post la pordon. Reveninte la gastoĉambron, ŝi senkonscie fermis la pianon, longe rigardis la notan vinjeton kaj sidiĝis. Ŝi ne povis stari, nek pensi ... De la ekscitiĝo kaj batalemo restis en ŝi nur malforteco kun apatio kaj enuo. La konscienco murmuris al ŝi, ke ŝi kondukis dum la vespero malbone, malsaĝe, kiel malgranda knabino, ke tuj ŝi estis ĉirkaŭprenita sur la teraso kaj eĉ nun ŝi sentas ĉe la talio kaj ĉe la kubuto ian maloportunecon. En la gastoĉambro estis neniuj, nur brulis kandelo. Sofio sidis sur ronda tabureto antaŭ la piano, ne movante sin, ion atendente. Kaj kvazaŭ profitante ŝian ekstreman laciĝon kaj la mallumecon, ŝin komencis venki peza, nekontraŭstarebla deziro.

Kiel boao ĝi vindis ŝiajn membrojn kaj animon, pli-grandiĝis kun ĉiu sekundo kaj ne minacis, kiel antaŭe, sed staris antaŭ ŝi klare, en sia tuta nudeco.

Duonhoron ŝi sidis, ne movante sin kaj ne malhelpante al si pensi pri Iljin, poste maldiligente ŝi leviĝis kaj iris en la dormoĉambron. Andreo jam dormis en la lito. Ŝi sidiĝis ĉe la malfermita fenestro kaj sin donis al la dezirataj pensoj. Implikiĝon en la kapo ŝi ne plu havis, ĉiuj sentoj kaj pensoj unuanime amasiĝis apud unu klara celo. Ŝi provis batali, sed tuj forlasis la batalon ... Nun ŝi komprenis, kiel forta kaj senkompata estas la malamiko. Por batali kun ĝi oni devas havi fortan volon, sed la edukado kaj la vivo donis al ŝi nenion, kio povus doni al ŝi apogon.

”Senmorala, malbonulino!” ŝi riproĉis sin pro la malforteco. ”Jen kia vi estas?”

Tiel la malforteco ekindignis ŝian ofenditan virtecon, ke ŝi nomis sin per ĉiuj insultaj nomoj, kiujn ŝi konis, kaj diris al si multe da ofendaj, malestimigaj vortoj. Tiel, ŝi diris al si, ke ŝi neniam estis bonmorala, ŝi ne malbonkonduktis nur tial, ke ne estis kaŭzo, ke la tuttaga batalado estis nur amuzo kaj komedio.

”Ni supozu, ke mi kontraŭstaradis. — ŝi pensis, — sed ĉu ĝi estas kontraŭstaro? Ankaŭ la publikulinoj kontraŭstaradas antaŭ ol ili sin vendas, sed tamen vendas sin.

Bona estas la kontraŭstarado! Kiel lakto, ĝi kazeiĝis en la unua tago! En la unua tago!”

Ŝi kulpigis sin, ke ne amo tiras ŝin el la domo, ne la personaj ecoj de Iljin, sed la sento, kiu ŝin atendas anstataŭe ... Ordinata frivola virino!

”Jen patrinon oni mortigis ĉe malgranda birdeto”, ekantis iu post la fenestro raŭktone.

”Se mi iru, estas jam tempo,” ekpensis Sofio. Ŝia koro subite forte ekbatis.

—Andreo! — ŝi preskaŭ kriis. — Aŭskultu min ... Ni veturos? Jes!

—Jes ... Mi jam diris al vi: veturu sola!

—Sed aŭskultu ... — ŝi diris. — Se vi ne veturos kun mi, vi riskas perdi min! Mi ŝajne jam estas ... enamiĝinta!

—Kiun? — demandis Andreo.

—Por vi ŝajne estas egale, kiun! — ekkris Sofio.

Andreo levis sin, malsupren metis la piedojn kaj mirante rigardis la malluman figuron de la edzino.

—Fantazio! — li diris oscedante.

Li ne kredis, sed tamen li ektimis. Meditante iom kaj dirinte al la edzino kelkajn negravajn demandojn, li diris sian opinion pri familio, pri perfido ... Parolis maldiligente ĉirkaŭ dek minutoj kaj kuŝiĝis. Liaj sentencoj ne havis sukceson. Multaj opinioj estas en nia mondo, kaj granda parto el ili apartenas al homoj, kiuj ne estis en malfeliĉo!

Malgraŭ la malfrua tempo, post la fenestro ankoraŭ moviĝis somerloĝantoj. Sofio metis sur sin malpezan mantelon, staris iom, iom meditis ... Ŝi havis ankoraŭ decidemon por diri al la edzo:

—Ĉu vi dormas? Mi iras promeni iom ... Ĉu vi deziras iri kun mi?

Tio ĉi estis ŝia lasta espero. Ne ricevinte respondon, ŝi eliris. Estis venta kaj malvarmeta vetero. Ŝi ne sentis venton, nek mallumon, sed iris kaj iris ... Nevenkebla forto pelis ŝin kaj, ŝajnis, se ŝi haltus, ĝi puŝus ŝin je la dorso.

”Senmorala! — ŝi murmuretis senkonscie. ”Abomenulino!”

Ŝi sufokiĝis, ruĝiĝis pro honto, ne sentis siajn piedojn, sed tio, kio ŝin puŝis antaŭen, estis pli forta ol ŝia honto, ol prudento, ol timo ...

**Anton Ĉeĥov**

*El la rusa tradukis M. Novodereĵkin*

## Mi perdis Annan

*Tänasest minul immitseb roostet kidane rauakild südames.  
Ekde tiu temp' likas mia kor' pro rusteronĝita peceto.*

Paul-Eerik Rummo  
*(Ballaad mürsukillust südames)*  
*(Balado pri obussplit' en la kor')*

**L**a urbo kuŝis sub la premanta somera suno, kiel jam pasintjare. Interesa miksaĵo de oriento kaj okcidento. Moskeo apud ortodoksa preĝejo, romiaj ruinoj, luksa centro. Mizero tie ŝajnis neebla kaj tamen estis proksima.

Ili sidis ambaŭ en la ĉina restoracio, kie ili tiel bone manĝis pasintsomere. La manĝaĵoj estis la samaj, la urbo estis la sama, tamen ĉio estis malsimila.

Ŝi, brunhara, kuprahaŭta, lante enbuŝigis sian sojan rizon, seriozmiene kiel plej multaj homoj ĉilandaj. Li glute voris rizan viandaĵon, ŝvitante pro la varmego, pene uzante la landan lingvon kun forta fremda akcento. En lia voĉo percepteblis iom da tristeco.

Pasis jam unu jaro de ilia konatiĝo. Li post longa esperanta korespondado venis al ŝia lando, pasigi kun ŝi feriojn, aviadile el sia riĉa industria lando en tiu forgesita historie kaj nature riĉa lando. Jam en la flughaveno io en ŝi tuj plaĉis al li. Li ŝatis ne nur ŝian belecon, sed ankaŭ ian seriozan sindetenon kaj ŝian simplan koran afablecon.

Ankaŭ al ŝi io en li tuj plaĉis, li aspektis pli juna ol ŝi time kredis, simpatia, kaj alportis certe pecon el la nealirebla moncdoparto, kie la vivo pli belas, kie ĉiuj ĉilande ŝatus vivi.

Jes, la vivo ĉi tie estis pli ol malfacila. De dek jaroj, ĉio senĉese malboniĝis, la prezoj senfine kreskis, senlaboreco pli kaj pli disvastiĝis. Kiel vivteni sin kun plenkreska studanta filo, la salajro ja apenaŭ sufiĉas por manĝi? Baldaŭ ŝi estos sola, ŝia filo ja iros vivi sian propran vivon, plenkreskuloj ja forlasas sian patrinon. Ŝi nepre trovu viron, kiu ŝirmu ŝin kontraŭ soleco kaj malriĉeco, eĉ kiel li el tiu lando, kies belsonan lingvon ŝi lernetis en lernejo. Pri tio ŝi cerbumis en ŝia jam delonge provizora loĝejo en mizera kvartalo, kie bruis ciganidoj sur la vasta korto, plena de rubaĵoj.

Li brakumis ŝin en la loĝoĉambro, kiam ŝi venis voki lin en la kuirejon, ŝi ne rezistis. Ŝia lango respondis al lia kun delica lerteco, ŝia korpo algluiĝis al lia kun plezuriga

varmo. De tiam iliaj kunaj tagoj preskaŭ senĉese banis sin en feliĉo.

Ili somerumis kune en ŝia lando. Vizitis pitoreskajn montojn, ili haltis en la malnova ĉefurbo de la lando. Li povis facile pagi per sia okcidenta salajro al ŝi neatingeblajn luksaĵojn. Ili dormis en bonaj hoteloj, manĝis en restoracioj. En la mezepoka ĉefurbo ili vidis el sia ĉambro la pitoreskajn stratetojn de la malnova urbo rande de ravino. La tagoj rapide forglitis en la varmego. Ŝi vizitis kun tiom da miro kiom li la fortikaĵon, la grandan centran bulvardon kun kafejoj, kie sidis la junularo sub la ombro de la arboj. Ili provis la lokan kuirarton en restoracietoj. En la tuta urbo oni spiris orientan parfumon kaj oni sentis sin okcidente, atesto de la landa historio. Vespere post ŝia al li ŝajne senfina duŝado ili kuŝis kune en la lito kaj sin kisadis, karesadis, seksumis ... la noktoj kaj la tagoj kunfandiĝis en intensa feliĉo.

Ili prenis ĉambron ĉe la maro. Oni atingis la plaĝon per kruta deklivo, kie inter arboj kuŝis somerdomoj, etaj kafejoj kaj restoracietoj. Ankaŭ tie, ĉio havis paradizan koloron ...

Alproksimiĝis la fino de la libertempo. Ŝi tute ne emis reveni hejmen. Hejme ŝi iĝis nervoza, silentema, ankaŭ lin premis sento de tristeco. Ŝi komencis riproĉi al li bagatelaĵojn, nefalditan littukon, rapidan manĝoritmon, malsimilan muzikan guston. Ŝi tamen plu regalis lin



dum la du lastaj noktoj. Li foriris kun miksitaj sentoj. En la flughaveno ŝi ŝajnis tute sensenta. Li eksentis ioman senpeziĝon kiam la aviadilo ekflugis ...

Li revenis al ŝi dum la venontaj ferioj. Post senfina jaro en kiu ili retskribis. Li retpostis ĉiutage ammesaĝon, ŝi proponis letere vivi kun li, egale ĉu en lia aŭ ŝia lando, ŝi ne plu eltenis solecon en mizero. Li serioze pensis eksedziĝi. Li vizitis advokaton. Divorci estus multe malpli facila ol li pensis. Plurjara proceduro, duono de liaj havaĵoj kaj salajro al lia delonge kunvivanta edzino. Ŝi ne povos kompreni, en ŝia lando divorci estis simpla formalaĵo. Kaj kio poste? Ĉu li povos vivi en ŝia lando, ĉirkaŭata de mizero? Ĉu ŝi povos vivi en lia lando, ĝisfunde lerni la lingvon, akcepti ordinaran laboron poste, ekzemple kiel kasistino? Ĉu indas la penon ĉion oferi por tio? Li proponis, ke ili ĉiujare feriu kune, li helpos ŝin finance. Ŝi volis lin tuta.

Ili revivis la pasintan jaron. La sama hotela ĉambro, la sama ĉambro ĉe la maro. Preskaŭ ĉio estis senŝanĝa. La kafejo havis la saman serviston, kiu rekonis ilin. Vespre venis denove karesoj. Ŝi insistis ... ŝi volis nepre, ke ili vivu ĉiam kune ... li ne povis ... ŝi ne komprenis.

Finfine, li ne plu eltenis kaj eksplodis, minacis ekkolere, ke li forlasos ŝin tuj, se ŝi daŭre insistos ... Li kvietigis ... sentis svagan, doloran impreson, ke io estas rompita, ke io estas perdita.

Ŝi silentis.

Venis strangaj tagoj, miksaĵo da afableco kaj kolero. La maro ne plus same bluis, inter ili estiĝis iu nova sento. Li silentis, ĉiam kun dolora sento. Hejme ŝi alternis dolĉecon kaj kruelecon. Ofte ŝi faris al li riproĉojn pri io ajn, lingva erareto, aroganteco de liaj samlandanoj, kiujn ŝi rekte ne konis. Li komprenis, ke ŝi volas vundi lin. Alproskimiĝis la tago de lia foriro, ŝi subite kvietiĝis. Estas remito, li pensis. Gravaj malsanoj konas remiton antaŭ la morto ... antaŭ la morto de nia amrilatoj.

Mateniĝis, kiam li forveturis hejmen. Li iom timis pro la longa nekonata vojo. Ŝi kuŝis en la lito en la kurta noktatemizo, kiun ŝi iam aĉetis por plaĉi al li. Elsub la temizo videblis ŝia hara sekso, ili kisetis ŝin, li sentis ke estis lastfoje, pro tio ŝia spiroodoro restis longe en lia memoro.

”Mi skribos,” diris ŝi adiaŭe. Li sciis, ke ŝi ne plu skribos.

Li veturis longe kaj senprobleme hejmen. Sur la ĉefstrato preskaŭ ne estis trafiko. La homoj ĉi tie malofte havas aŭtomobilon kaj kiam ili havas, ili malofte povas pagi benzinon. Iom antaŭ la limo nova aŭto staris duone frakasita pro nesignalita sablamaso, la stirinto staris apude kaj ploris.

Denove li estis hejme kaj laboris. La vivo normale fluis, lia edzino estis indiferenta por li, kiel jam delonge.

Foje finlaborinte hejme, li plu sidis antaŭ la komputilo, legis gazeton el la feria lando, kaj finleginte, longe sidis, rigardante sur la ekrano fotojn de haraj piĉoj ...

**Robert Pontnau**

## La sekreto de la arbaro

**L**onga estis la vojo al Vassträsket\*. Unue oni devis iri tra profunda arbaro sur mallarĝa vojeto, kiu serpentumis inter la altaj pinoj kaj parte iris sur nudaj rokplatoj. Kie la rokoj malleviĝis, eketendis sin Vitmossen\*\*. Sur la tufaĵoj leviĝis la malgrandaj pigmepinoj, kaj dum la miriko floradis, la aero estis plena de la spicodoro, kiu tien allogis la insektojn. Ankaŭ estis relative longa vojiro tra la marĉejo, kaj kiam la montoj ree leviĝis kaj de ilia kresto oni vidis la arbaron maldensiĝanta kaj la akvon kuŝanta spegule klara kaj kvietita inter la bordoj vestitaj de piceoj, tiam oni ankoraŭ ne estis tie. Ĉar sur la alia flanko de la akvo troviĝis la kabano. Se oni volis tien iri piede, oni ankoraŭ havis longan vojon. Sed se oni haltis sur la bordo, kie la kabano estis videbla kun siaj malgrandaj kampetoj kaj la pinglarbaro en rondo ĉirkaŭ la

\* *Vassträsket* = Kanmarĉo.

\*\* *Mosse* = marĉeca, preskaŭ sekiĝinta grundo, ofte torfa, sur kiu kreskas diversspecaj likenoj.

*Vitmosse* = tia grundo surkreskita de sfagnoj.

kliniĝinta bovinejo kaj la malalta loĝdomo, se tiam oni vokis sufiĉe laŭte kaj oni donis al si tempon por atendi, jen venis sur la transa flanko malgranda kurbigita maljunulo kun ruĝa pintĉapo kaj lana kamizolo, singarde iris malsupren sur la ŝtonplena deklivo kaj elpuŝis ŝanceliĝeman prameton por transpasigi la vokinton.

Se oni tiel remis trans la malgrandan lagon, oni devis miri, ke ĝi estas nomata Vassträsket. Ĉar marĉon oni ne povis vidi, nur malgrandan lagon, kiu impresis hele kaj afable post la longa promenado en la arbara krepusko sub la densaj piceoj, sur kiuj plene pendis longaj, grizaj tufaj likenoj. Nek oni povis tuj distingi kanojn. La bordoj nome konsistis el malmolaj rokoj, sub kiuj la piceoj, kreskantaj en la humo super iliaj krestoj, speguliĝis en la kvieta lago. Nur plej funde en la golfeto, kie la lago kurbiĝis malantaŭ la montojn, malfrusomere densiĝis verda kanaro, en kiu ĉiun printempon nestis paro da anasoj kaj, kiam la idoj estis elkovitaj, senĝene ĉirkaŭnaĝis sur la glata akvospegulo.

Jakob, kiu sidas kaŭre ĉe la remiloj kaj transpasigas la venanton, nome neniam povis ŝati tion, pafi per fusilo. Almenaŭ li mem tiel diras, tamen tio ja, kiel multaj aliaj aferoj, ne devas esti nepre vera. "Kiam mi estis juna", li diras, "mi ja provis. Sed mi neniam tute sukcesis. Ĉar mi havis kvazaŭ kriplaĵon. Mi neniam povis lerni fermi nur unu okulon. Pro tio el la pafado fariĝis nenio. Nun mi ja

povas fermi kaj unu okulon kaj du. Sed nun mi estas tro maljuna por lerni ĝin. Kaj tial mi lasas tion.” La anasoj ankaŭ scias, ke neniu ĝenas ilin. Sen zorgo pri la boato alremata, la anasino kaj ŝiaj flugipovaj idoj alnaĝas la bordoponton. Tie ili serĉadas forĵetaĵon de fiŝoj kaj ter-pomŝeloj, kvakas, subakviĝas, interbabiladas kaj konduktas kiel dombestoj. Jakob devas forpeli la tro kuraĝajn, kiam li volas albordiĝi.

Tiamaniere Jakob pasigis multajn venantojn trans la lagon, kaj se la nombro fine fariĝis granda, tio ne estas mirinda. Li nome tiel longe loĝis en la kabano apud Vassträsket, ke neniu plu povas diri, kiam li ekloĝis tie, certe apenaŭ li mem. Cetere malofte venas fremdulo tien. Por tio la vojo estas tro longa, kaj kiu loĝas ĉe Vass-träsket, ne havas multon por prezenti. Aŭ pli ĝuste — dum li vivis, li ne havis. Ĉar nun Jakob estas jam delonge mortinta kaj lia edzino kun li. La domo ankaŭ estas kaduka nuntempe, la plugkampo estas invadata de fiherboj kaj refariĝas sovaĝejo. Ĉar tiel malproksime kaj solece en la arbaro, kiel troviĝas Vassträsket, nun ekloĝas neniu, kiu mem povas elekti. En malnova tempo estis pli abunde da solec-amantaj homoj, kiuj ne timis la dezerton.

Jakob kaj lia edzino estis du strangaj izoluloj, kiajn oni ankoraŭ kelkfoje trovas profunde en la arbaro, malproksime de la loĝejoj de aliuloj, kaj se ili volus rakonti ĉion

pri siaj sortoj, ili certe havus strangajn aferojn por diri. Ĉar Martina estis unu el tiuj, kiuj vidis kaj la Virinon de la Arbaro kaj la Nikson; kion signifas la vaglumoj super Vitmossen, pri tio ŝi ankaŭ povis rakonti, kiam ŝi volis, kaj por ĉio, kio flustras kaj susuras en la arbaro aŭ plendas kaj ĝemas, kiam la vintra nokto kuŝas stelklara kaj malvarma super la frostigita lago, ŝi havis okulon kaj orelon. Martina konis tiajn aferojn tre bone kaj povis interpreti ĉiajn sorĉaĵojn multe pli klare kaj senkonfuzo ol ion alian, kio okazis dum ŝia senvaria vivo. Sed plej bone ŝi tamen komprenis tiujn etajn estulojn, kiuj prizorgadas ĉirkaŭe en arbetaĵoj kaj densaĵoj, kondukas ŝin laŭ ĝusta vojo en la arbaro kaj disiĝas de ŝi, nur kiam ŝi elprenas la ŝlosilon de ĝia multjara loko en la fendo sub la fenestro. Tiam ili forpaŝetas sur malpezaj piedoj, ĝojaj ke ili povis akompani ŝin tiel longe. Kaj se tiam la lupo blekis malproksime sub la neĝokovritaj piceoj, ja Martina sciis, al kiu ŝi dankas, ke ŝi venis hejmen sen difekto. Jakob ĉiam aŭskultis silente, kiam la edzino rakontis pri tiaj aferoj, kaj kelkfoje okazis, ke li balancetis konfirme la kapon kvazaŭ por doni al ŝiaj vortoj tiun subtonon, kiun ili meritis kaj eble bezonis. Sed ofte li sidis tute indiferenta, nur fikse rigardante antaŭen, kvazaŭ li vidus, kion neniu alia povas vidi, kaj en tiaj okazoj povis esti, ke lia vizaĝo ekhavis severan, preskaŭ indignan esprimon, kvazaŭ li volus diri: "Kial vi rakontas pri tiaj

aferoj al homoj, kiuj mem nenion vidis? Kion tiaj scias pri la arbaro?”

En sia junaĝo Jakob estis karbigisto, kaj tiam li almenaŭ perlaboris sufiĉe, ke li ne devis esti ŝarĝo al aliaj homoj. Martina kolektis berojn, vendis korbojn, kunhelpis en la domoj de la vilaĝoj ĉe kristnasko aŭ pasko, kaj ŝi estis bone konata vaste ĉirkaŭe. Ĉar ĉiam ŝi donis plenan mezuron, ĉiam ŝiaj beroj estis freŝaj kaj ĵuskolektitaj, neniam oni bezonis timi pri ŝi, ke renversinte la korbon oni trovos nematurajn berojn ĉe la fundo. Bone faritaj kaj solidaj estis ŝiaj korboj, kaj pri panfarado kaj buĉado Martina estis sperta, kvankam ŝi vivis tiel malproksime de loĝataj lokoj. Ankaŭ neniam la vojo estis al ŝi tro longa, kaj se ŝi ne multe sciis pri tio, kio troviĝas en la libroj, ŝi anstataŭe havis des pli multe de alia speco, kion ŝi volonte rakontis al ĉiu, kiu volis aŭskulti.

Cetere ankaŭ Jakob ne estis viro, kiun ĉiu ajn povus trovi, kie li lasis lin. Per maŝkaptilo li kaptis la bestojn de la arbaro kaj pafis ilin ankaŭ, malgraŭ siaj propraj vortoj. Troviĝis iuj, kiuj pretendis scii, ke dum li estis juna, neniu estis, kiu pli firme alcelis kaj havis pli rapidan manon ol Jakob kiel pafisto. Sian malnovan antaŭŝargan pafilon li havis kaŝita malantaŭ la lito, la historio, ke en sia junaĝo li ne povis fermi nur unu okulon, kredeble estis elpensita, ĉar Jakob volis mem elekti la tempon por ĉaso kaj neniam povis submetiĝi al tiuj limigoj, per kiuj



avaraĉa ĉasostatuto ŝarĝas la civitanon. Jakob do, per unu vorto, en pasintaj tempoj havis sian porvivon, kaj tri filoj eliris el la malgranda hejmo ĉe Vassträsket kaj fariĝis laboristoj en lokoj, kie oni povis pli multe perlabori kaj jam neniu aŭdis pri kio flustras la arbaro.

Pri tiuj infanoj Jakob kaj Martina komence interparolis dum la longaj vintrovesperoj, kiam fariĝis tre silente ĉirkaŭ ili kaj neniam iu venis por ilin viziti. Sed la jaroj pasis, Vitmossen kaj la lago sub ilia fenestro multajn fojojn frostiĝis, kaj multajn somerojn venis kaj formigris la anasoj. Sed ĉirkaŭ la du maljunuloj estis tiel silente, kvazaŭ neniu infanoj iam ludis sur la deklivo al la lago, kaj ju pli longe daŭris tiu silento, des pli Jakob kaj Martina kunligiĝis unu al la alia, forgesis, ke la mondo ekster ili ekzistas, kaj trovis tute en ordo, ke neniu memoras ilin, kiuj delonge preskaŭ forgesis ĉiujn aliajn.

La arbaro kantis sian kanton al la du maljunaj homoj, kaj tion malmultan, kion ili postulis de la vivo, ili ankaŭ ricevis, ĝis iutage Jakob devis resti en la lito. Kian malsanon li suferis, neniu el ili sciis, sed ĝi komenciĝis tiel, ke kiam li iris longan vojon aŭ longe staradis, tre stranga doloro en la kruroj lin atakis, kaj iun matenon kiam li vekigis, li ne plu povis sin apogi sur la kruroj, sed devis resti en la lito.

—Vi do devas nun zorgi pri la nia, Martina, diris Jakob, kiam mi ree ellitiĝos, vi povos ripozi.

Estis multo, kio nun mankiĝis, dum Jakob kuŝadis. Venis en la domon neniŭ ĉasaĵo el la arbaro, kaj neniŭ fiŝo estis kaptata el la lago. La ligno ankaŭ ne iris hejmen propramove, kaj vira helpo por fari truon en la glacio ne troviĝis. Sed plej malfacile estis pri la furaĝo por la bovino. Martina pene laboris per la falĉileto, tranĉis kaj portis hejmen, kiom ŝi nur povis. Sed fariĝis al ŝi tro peza ĉio ĉi. Longajn tempojn ŝi sidadis en la arbaro plorante, ĉar ŝi ne volis plori hejme. Jakob kuŝis, kie li kuŝis, kaj estis ja bone, ke li ĉiam estis pacienca kaj afabla. Aliokaze Martina neniam povus elteni

Fine okazis ilia plej granda malfeliĉo, ke iun vintron la bovino mortis pro malsufiĉo, kaj tiam restis al Martina neniŭ alia rimedo ol iri almozpeti en la vilaĝoj. Malfacila tio estis al ŝi, kiu antaŭe neniam petis ion de homoj. Malgranda kaj kuntiriĝinta ŝi aspektis, rapide ŝi iris, kaj kien ŝi venis, tie ŝi restis tiel mallonge, kiel ŝi nur povis pro ĝentileco. Ĉar neniam Martina havis trankvilon, dum ŝi estis for de la hejmo. Tie kuŝis Jakob kaj eĉ ne povis iri trans la plankon por fari fajron al si mem, se malvarmiĝus vespere. Kaj pli da manĝaĵo li ne havis ol tion malmultan, kion ŝi almetis al li, kiam ŝi foriris. Afliktita kaj ĉagrenita aspektis Martina, kie ŝi iradis, la lakto-kruĉon ŝi tenis per la mano kaj sur la dorso ŝi portis la almozosakon, tiel ke la hundoj elkuregis tra la barilporoj laŭ la vojo kaj bojis, kie ŝi preteriris.

Dum du jaroj Martina tiel iradis, kaj dum tiu tuta tempo ne fariĝis pli bone al Jakob, pli malbone ankaŭ ne fariĝis. Fine ne estis diferenco inter tago kaj nokto, somero kaj vintro, sunlumo kaj pluvo. Fariĝis nur unu longa tago de mizero, kiu ŝajnis ne havi finon.

—Se mi nur povus morti, Jakob kutimis diri. Tiam ja estus pli bone al vi.

Tiam Martina fariĝis tiel malforta, ke ŝi ne povis reteni la larmojn, kiom ajn ŝi volis.

—Kio fariĝus el mi, se vi mortus? ŝi diris.

En sia interno ŝi sentis, ke tiel malbone kiel nun estas, neniam povos esti. Sed diri tion al li, kiu kuŝis tie kaj ne povis helpi al si mem, tion ŝi ne kapablis.

Tiam estis iu somera tago, kiam Martina venis el la vilaĝoj ironte hejmen. Multon ŝi ne havis. Ĉar la homoj laciĝas doni al tiuj, kiuj devas ofte peti pri helpo. Kaj almozpetado estas peza profesio al tiu, kiu ne ĝojas pri la vivo. La sako, kiun ŝi portis sur la dorso, tial ne estis ŝarĝa, kaj la laktokruĉo, kiun la eta maljunulino tenis per unu sia mano, ankaŭ ne estis peza. Varmege rostis la suno, kiam Martina estis ironta tra Vitmossen. Tie maturiĝis la marĉorubusoj\* sur la tufaĵoj, kaj malproksime inter la piceoj fajfis la pluvbirdo\*\*. Kiam Martina estis

\* *Marĉorubusoj*: speco de rubusoj kun flavaj beroj manĝeblaj, *Rubus chamaemnorus*.

\*\* *Pluvbirdo*: popola nomo de la nigra pego, *Picus martius*, kiu laŭ legendo krias, ĉar ĝi volas akvon.

plu irinta, ŝi devis kliniĝi por rigardi la nematurajn vakciniojn. Tute ĉirkaŭ siaj konataj lokoj ŝi iris, kliniĝis super la arbustaĵoj, nur rigardis kaj rigardis. Ho, kiom da nematuraj estas! Kaj kia abundo da maturaj mirteloj! Nur ŝi ja ne povas kolekti ilin kaj vendi kiel antaŭe, ŝi, kiu ĉirkaŭiras en la vilaĝoj kaj petadas almozojn, pro tio ke ŝi ne havas tempon samtempe flegi malsanan edzon kaj labori por ili ambaŭ. Kiel silente ĉi tie estas kaj kiel solece. Martina lasis fali la sakon, demetis la kruĉon kaj sidiĝis. Kiel laca ŝi estas, laca pri la tuta vivo! Se la Virino de la Arbaro nun volus veni kaj donaci ion al ŝi! Aŭ li, al kiu ŝi ne volas pensi eĉ laŭnome, li, kiu ĉiam estas preta, kiam homo estas en efektiva mizero! Kial li ne venas nun? Kial ŝi ne vidas. Ŝi, kiu vidis tiel multe? Kial ŝi nun eĉ ne aŭdas la etulojn prizorgantaj en la densaĵoj, ŝi, kiu aŭdis tiel multe antaŭe? Kial silentas la arbaro? Kial ne troviĝas homo, kiu volas iri kun ŝi hejmen kaj vidi kiel statas al ŝi, helpi en la mizero kaj iom malpezigi tion, kion maljunulino ne kapablas sola porti?

Sed la arbaro silentis ĉirkaŭ Martina. Ŝi aŭdis la urogalon brui malproksime en la arbaro kaj bati per la flugiloj la branĉojn de la pinoj por supreniĝi. Ŝi aŭdis la kolombojn kverantaj kun siaj akraj, knaraj sonoj, kaj la strangan birdon, kies nomon ŝi neniam aŭdis, krianta kiel homo en danĝero. Sed cetere ĉio ĉirkaŭ ŝi estis silenta. La arbaro silentis. Nenion ŝi vidis krom arboj, ping-

loj, sunlumo, muŝoj, musko kaj grizaj likenoj. La aero vibris de varmego, kaj ĉio staris tiel senmove ĉirkaŭ ŝi, ke ŝi ektimis.

Martina, kiu loĝis sian tutan vivon en la arbaro, kiu aŭdis la vulpon bleki en la vintraj noktoj kaj vidis la lupon en la malvarmega, stelklara vintra nokto ŝteliri kiel griza fantomo ĉirkaŭ la fermita bovinejo, por la unua fojo en sia vivo timiĝis esti sola en la arbaro. Estis kvazaŭ la arboj starus al ŝi tro proksime, kvazaŭ iĝus tro silente ĉirkaŭ ŝi, tro malplene, tro dezerte, tro kviete. Tremante ŝi leviĝis por ekiri. Tremante ŝi pendigis la sakon sur la dorson, prenis la laktokruĉon per la mano. Tremante ŝi staris senmove kaj aŭskultis ĉi tiun profundan silenton, kiu aŭdiĝis kiel unu peza, de neniu alia sono interrompita ĝemo. Necerta pri siaj propraj paŝoj ŝi iris plu kaj ne haltis ĝis ŝi atingis la bordon, kie kuŝis la ŝanceliĝema prameto. Rapideme ŝi engrimpis kaj elpuŝis ĝin de la bordo. Sed ŝajnis al Martina, ke estas kvazaŭ manoj, kiuj volas ŝin kapti, tuj kiam ŝi turnas sin. La arbostumpoj en la arbaro, la radikoj, la maljunaj falemaj arboj, la kunmuskaj ŝtonoj kaj la juniperoj, kiuj rondaj kaj hirtaj kreskis plej ekstreme sur la rokplato, ĉiuj havis vivon, ĉiuj silentis, silentis tiel, ke ili plenigis la aeron per sia silento kaj transformiĝis en abomenindajn figurojn, kiu en ŝtona silento rikanis pri ŝia mizero. Rapide Martina remis trans la longan mallarĝan lagon. Ŝi aŭdis

la anasojn, kiuj kriis post ŝi siajn *knar knar*, la anasojn, kiujn Jakob neniam havis koron pafi. Sed ŝi ne turnis sin por rigardi ilin, nur suprentiris la prameton sur la teron kaj pli kuris ol iris preter la alnoj ĉe la bordo kaj supren al la kabano. Estis kvazaŭ la silento de la arbaro krius post ŝi kaj pelus ŝin antaŭen.

En la kabano Jakob kuŝis en la lito, kiel li kuŝadis la lastajn du jarojn. Kiam Martina envenis, li eĉ ne malfermis la okulojn, kaj ankoraŭ tremante tra la tuta korpo pro la arbartimego, la edzino iris al la kameno, plenigis ĝin per branĉoj kaj vergaĵo kaj ekbruligis fajron. Ĝi lumigis la malhelan ĉambron, kien la malgrandaj fenestroj enlasis tre malmulte da lumo. Sed ĝis la anguleto, kie kuŝis la vizaĝo de Jakob, la fajrolumo ne atingis, kaj tie, kie Martina sidis, ŝi ne povis vidi, ĉu la malsanulo ankoraŭ dormas aŭ vekigis.

—Ĉu estas vi, Martina? subite sonis la voĉo de Jakob el la angulo post la fenestro. Vi longe forestis.

—Mi estis laca kaj sidis por ripozi en la arbaro, respondis la edzino. Kiel estis al vi hodiaŭ?

—Kiel ĉiutage, venis la respondo.

La voĉo de Jakob sonis tiel klara kaj milda, ke Martina devis iri pli proksimen por rigardi lin.

—Verŝajne mi dormis kelkan tempon nun, diris la maljunulo. Dependas de tio, ke mi tiel longe kuŝis sola kaj pensis.

—Pri kio vi pensis? demandis Martina.

Strange! Estis kvazaŭ la arbaro sekvis ŝin en la kabanon kaj kunprenis la timegon.

Jakob alilokis la kapon por vidi pli bone. Nun la taglumo falis sur lian vizaĝon. Malgrasa kaj griza ĝi estis, kiel ĉe tiu, kiu longe ne vidis la lumon de la suno. Sed la maljunaj okuloj brilis.

—Mi tre volus vidi la sunon ankoraŭ unu fojon antaŭ ol mi mortos, li diris. La sunon mi ĉiam ŝatis kaj la kvietan lagon kun la arbaro ĉi ekstere. Ĉu vi kredas, ke vi povus porti min tiel longe, se mi mem kunhelpus laŭpove?

Martina aliris kaj sidigis sin sur la litrando.

—Kion vi volas tie ekstere? ŝi diris.

Jakob rigardis ŝin per okuloj, kiuj subite fariĝis tiel mirinde klaraj.

—Mi volas morti, li diris. Kaj vi helpu al mi. Ne timu pro tio, ke mi petas vin. Ne povas esti malfacile morti. Por vivi mi ne plu havas forton. Kaj kiam mi estos for, vi ne bezonos iri tra la vilaĝoj kaj almozpetadi por vivteni min.

Denove ŝajnis al Martina, ke la timego el la arbaro sekvis ŝin en la kabanon. Ŝi interplektis la manojn. Sekaj, maljunaj kaj ŝrumpintaj ili estis, ŝi komprenis, kion volas la malsana viro; longe antaŭ ol ĝi estis dirita, ŝajnis al Martina, ke ŝi aŭdis Jakobon peti kiel nun, kaj tra la

fenestro ŝi vidis, kiel brilas la suno kaj kiel kviete kuŝas Vassträsket.

—Vi helpu al mi eniri la prameton, diris la maljunulo, kaj elpuŝu ĝin sur la lagon. Poste ree supreniru ĉi tien kaj ne plu rigardu.

La okuloj de Jakob serĉis tiujn de la edzino tiel maltrankvile kiel tiuj de infano, kiam ĝi petas, ke ĝia plej alta deziro estu plenumata. Kaj nun sidante tie, Martina subite komprenis, ke ne povas esti alimaniere. Per ĉi tio la arbaro timigis ŝin, pri ĉi tio ŝi pensis sidante ĉe la finiĝo de Vitmossen, kie la rokmuro leviĝas sub la piceoj.

—Kiam vi volas tion? ŝi diris, kaj larmoj gutadis el ŝiaj maljunaj okuloj.

—Nun brilas la suno, diris Jakob.

Kaj denove lia voĉo sonis malpacienca, kiel tiu de infano, kiu ne volas atendi.

—Dum du jaroj mi kuŝis ĉi tie kaj nur pensis pri tio ĉi.

Tiam Martina sidigis sin ĉe la fenestro kaj pensis, kiom ŝia intelekto tion permesis al ŝi. Multe ŝi neniam legis en libroj kaj multe ŝi ankaŭ ne sciis. Longe ŝi tiel sidadis. Jakob kuŝis kviete kaj ne ĝenis ŝiajn pensojn.

Fine Martina leviĝis kaj vidis, ke la suno ankoraŭ staras sur la ĉielo. Tiam, ne dirante ion plu, ŝi prenis sian maljunan edzon, kun kiu ŝi kune vivis pli ol unu homan generacion, kaj levis lin en la lito. Poste ŝi portis lin el la kabano kaj sidigis lin sur la peroneto. Malgrasa kaj mal-



dika li fariĝis, kaj ne estis peze lin porti. Tie Jakob nun sidis kaj rigardis la sunon, la arbaron kaj la lagon kaj ĉion, kio foje estis lia.

—Se vi nun havas forton, helpu min plu, li diris fine.

Tiam Martina portis la kriplan viron malsupren al la bordo kaj sidigis lin en la prameton. Sed farinte tion ŝi kunfalis, prenis la manon de Jakob kaj ne povis paroli.

—Nun elpuŝu la prameton, Jakob diris mallaŭte, kaj farinte tion iru returne en la kabanon kaj ne restu tie ĉi. Tie elprenu la libron kaj legu en ĝi. Dio certe komprenas ĉi tion, li kiu scias, kiel estis al vi kaj mi.

Tiam Martina prenis la manon de Jakob kaj premis ĝin adiaŭe. Poste ŝi elpuŝis la prameton de la tero kaj atendis sur la bordo, ĝis ĝi venis sur profundan akvon. Poste ŝi sola supreniris la deklivon, kaj veninte en la kabanon ŝi elprenis malnovan libron kaj provis legi en ĝi. Ne en la biblio ŝi legis. Estis Tomaso de Kempis. Sed al Martina tiuj du libroj estis unu, kaj aliajn ŝi neniam posedis.

Duonlaŭte la maljuna virino legis la nekompreneblajn vortojn de la libro. Malflue kaj balbute ŝi legis, sed fremdaj estis al ŝi la bone konataj vortoj, kiujn ŝi trovis. En ŝia tempo oni ne lernis multe en la lernejoj, kaj la plejmulton, kion Martina lernis, ŝi jam delonge forgesis. For de la vortoj iris ŝiaj pensoj, kaj tamen Martina trovis ian konsolon en tiuj fremdaj vortoj, eble ĝuste pro tio ke ŝi

komprenis tiel malmulte el ili. Kiam ŝi jam legis tiel longe, kiel ŝi volis, ŝi singarde remetis la libron sur la breton. Poste ŝi ree malsupreniris la deklivon kaj vidis, ke la prameto naĝas malplena sur la akvo. Tiam Martina sidiĝis sur la bordo, kaj kion ŝi tiam pensis kaj vidis, estis pli ol ŝi povis klarigi. Sed Martina kredis, ke ŝi pensas pri la animo de Jakob, pri si mem kaj pri ĉio, kion ili ambaŭ kune travivis. Pie kaj naive ŝi legis "Patro Nia" super la kvieta akvo, en kiu speguliĝis la arbaro. Kaj tion farinte ŝi reiris al la kabano, pendigis purajn litotukojn antaŭ la fenestroj kaj ŝutis picepinglaĵon sur la vojo, kiu iris inter la peroneto kaj la lago.

Post tio ŝi enlitiĝis kaj por la unua fojo dormis sola en la kabano apud Vassträsket.

Kiam Martina poste venis en la vilaĝon por ricevi helpon trovi la korpon de Jakob kaj fari la enterigon, ŝi naive rakontis ĉion, kiel vere okazis. Sed ĉiuj kredis, ke ŝi rakontas fabelon. Nur kiam tiuj, kiuj sekvis ŝin, trovis la litotukojn antaŭ la fenestroj kaj vidis, ke estas picepinglaĵo de la kabana peroneto ĝis la lago, ili povis kredi, ke tio stranga, kion ŝi rakontis, estas vero. Kaj kiam la mortinta korpo de Jakob fine kuŝis vindita en tiu lito, kie Jakob mem tiom da jaroj kuŝadis malsana, tiam multaj staris ĉirkaŭ li, pli multaj ol iam ajn kolektiĝis en la malalta kabano.

Tiam ĉiuj komprenis, ke kio okazis ĉi tie, neniuj scias. Kio okazis, tio estas sekreto de la arbaro, kaj neniuj el tiuj, kiuj konas ĝin, rajtas malkaŝi, kion ili vidis kaj aŭdis, aŭ rakonti tion tra la vilaĝoj. Ĉar kion Martina faris, tion ŝi faris pro naiveco kaj pro mizero. Kaj tion decas vidi nur ĉi tie, kie la arbaro sin etendas mejlovaste kaj kie la silenta lago spegulas la arbaron.

**Gustaf af Geijerstam**

*El la sveda tradukis Birger Gerdman*

## La pretendema gasto

**E**stos nur tute mallonga vizito. Tial kolerigas min, ke ĉio tie ĉi estas en tiel diabla malordo.

Mi venas el la eterna mallumo al tiu ĉi hotelo de transkuraj turistoj, mi urĝas, mi devas esti preta pri ĉio rapide, mi deziras trankvilon kaj plaĉon, por ke estu eble al mi ĝui la agrablecon de la loko kaj konstati ĝian grandiozecon, pri kiu mi aŭdis paroli tiel multe. Kaj jen ĉio estas renversita. La mebloj estas turumitaj en grandaj amasoj ekstere en la halo, murpentristoj repentras la murojn kaj plafonojn, lignaĵistoj turnas la plankon kaj metas novajn panelaĵojn, marteladas, frapadas kaj naj-ladas. Krudaj, brutaj tipoj knedas cementon en vastegaj trogoj. Malheltrajtaj, pridubindaj individuoj rompas la ŝtuparojn. Strangaj, suspektindaj figuroj lakas la gvid-stangojn, poluras fenestrojn, translokas lumarmaturojn. Farbsiteletoj, rabotaĵo, mortero, najloj, segstabloj, ŝtipoj. Odoro de farbo, mastiko, cemento kaj freŝa ligno. Kaj krio kaj bruo kiel en la infero.

Ĉion oni devas malkonstrui. Kaj ĉion oni devas rekonstrui! Malkonstrui kaj rekonstrui, teren-reen, supren-teren!

Tiuj ĉi kruduloj puŝas, alkrias, admonas min, mi baras la vojon tuj, kiam mi venas internen kaj mi glitfalas pro iliaj malpuraj kraĉaĵoj dum mokplenaj insultoj.

Fine mi renkontas la servistaron. Ĝi estas ĝentila, en la renversiĝo ili ankoraŭ ne forgesis, kion oni ŝuldas al gasto. Oni estas ĉiel komplezema; sed oni povas fari nenion, nenion. Estis terure netaŭga tempo por la alveno, ĉio estas nura kaoso, oni staras komplete senpova.

Oni direktas min en ĉambron kun duone deŝiritaj tapetoj, komplete malmuntita kahelforno, kiu nun pleniĝas la duonon de la planko, ferlito sen matraco. Kaj oni rapide ekiras denove, ĉar mil aferoj estas almenaŭ iomete ordigotaj.

Tial estas terure, ke mi havas tiel baritan tempon. Dum mi estos tie ĉi, dum mi devos vivi en tiu ĉi konfuzo, en tiu ĉi kriaĉanta infero, ne povos esti ordo. Kaj mi revis pri tio, ke tie ĉi en paco kaj kvieto mi venos al klareco pri multo, ke mi koncentros min je io tuta, ricevos ion firman kaj definitivan por miaj pensoj, ke mi estos valora por io, antaŭ ol mi reekveturos. Sed en tiu ĉi kaoso mi povos neniam atingi la klarecon, tiun ĉi konfuzon mi neniam povos reordigi, kaj tute ne estas eble ĉi tie koncentri min al ia ordigita tuto.

Tamen mi havu amuzon. Mi iras dematene ĝisvespere inter farbsiteloj, rabotaĵo, cemento, mi rampas inter renversitaj mebloj, sur freŝaj, novodoraj bretaltaĵoj. Mi iras tagon post tago inter krudaj laboristoj, blasfemantaj kaj kraĉantaj. Kaj nokte mi kuŝas en mia lito, kies fertrabetoj profunde ĉizas mian dorson; sendorme, malsane, lacege, elĉerpite. Jaron post jaro. Jaron post jaro. Ĉar la tempo ĉi tie pasas kun furioza rapido. Apenaŭ oni estis komencanta kaj jam oni estas longe en ĝi.

Mi malesperas. Mi iras cirkle kiel frenezulo, kun pala kaj pro la nokta maldormo malsaĝa vizaĝo, angoro kaj sensenca cerbumo pri mia sorto. Mi mem sentas, ke mi ŝajnas esti stulta kaj konfuza, kaj se mi forgesas tion, la plebo ĉirkaŭ mi informas min pri tio. Sed tio ne interesas min. Mi donas min tute al mia malespero, al mia amara elreviĝo. Mi ne havas honton, mi vagadas kun larmaj okuloj inter tiuj ĉi kruduloj, disŝirite en angoro kaj doloro. Jaron post jaro. Pli kaj pli profunde min premas la kaoso, kriaĉo, la timiga malordo ĉirkaŭ mi, pli kaj pli profunden mi dronas en la cerbumado kaj malcerte-co, kio povas esti la senco de ĉio ĉi.

Fine mi ne kapablas elteni plu. Tiu ĉi malcerto plenigas min per la plej teruraj turmentoj. Estas penso, kiu mordas kaj mordas en mi, kiu neniam lasas min en paco; ĉar ĝi estas ververe nur unu. Mi devas demandi, mi devas

scivoli, eble mi povos scii. Kaj se mi estus sciinta nur t i o n , esence ĉio estus en ordo kaj bona kaj mi eble povus pensi pri tio, ke mi entreprenu ion kaj estu kiel tute ordinara homo. Mi haltigas serviston, min preterkurantan.

—Ho, pardonu ... Vi certe povus diri al mi ...

—Pri kio temas? li krias ĝentile, sed jam fore.

Tiam mi komprenas, ke mi ridindigas min. Je Dio, pri tio oni ne povas demandi iun, kiu tiel rapidas kiel tiu ĉi. Pri tio oni povas paroli al amiko, post kiam oni longe estis sidanta kaj interparolanta pri ĉio cetera en la mondo. Mi embarasiĝas. Mi forigas polveron de mia pantalono kaj atente rigardas miajn ankoraŭ preskaŭ elegantajn ŝuojn.

—Ho, tio estis nenio, mi diras, mi prenas mian horloĝon kaj nerveze reigas ĝin duontagon. Kaj li estas for.

Tiel estas denove jaron post jaro. Mi ekgriziĝas ĉirkaŭ la tempioj, mi estas laca, laca. Ĉirkaŭ mi marteliĝas kaj bruas, malkonstruiĝas kaj ripariĝas ĉio. Krio kaj bruo, bretaltaĵoj, brikoj, argilaj konstrutrabaroj. Krudaj viroj, blasfemoj, kraĉaĵoj, pro kiuj oni glitfalas.

Mi portas mian mizeron. Mi provas mem porti ĝin. Sed ĝi pli kaj pli peziĝas. Mi ne eltenas. Mi falas sub ĝi kaj tute kolapsas.

Mi devas apogi min al iu, serĉi helpon ĉe iu. Mi devas demandi, informiĝi, mi provu ekscii. Min rompas tiu ĉi

terura nescio pri ĉio, tiu ĉi senfrukta cerbumo por trovi sencon, ian sencon.

Iun tagon mi denove haltigas serviston. Mi devas esti kuraĝa, mi ne rajtas lasi lin forkuri de mi denove, mi devas lin demandi:

—Pardonu ... Vi povus ja ...

—Kiel mi povus esti je dispono? li diras tre ĝentile.

Mi denove embarasiĝas. Ĉe tiuj ĉi korektaj vortoj mi sentas, ke mi intencis esprimi min tro emfaze, ke mi troviĝas en ege ekscitita animagordo. Mi admiras tiujn ĉi banalajn, sed libere kaj senĝene prezentitajn vortojn, mi provas absorbi ilian tonon, mi dezirus volonte mem paroli proksimume samtone. Kaj dum mi staras iom malzorgeme kaj svingas mian bastonon, mi provas interĝeti la tuton tiel duone senĝene:

—O, estis io, pri kio mi pensis.

Sed daŭrigante mi sentas, ke mia tuta angoro erupcias, mi aŭdas, ke la voĉo tremas pro la ekscito, kvazaŭ homo krius en la plej profunda mizero:

—Diru al mi ... diru al mi ... k i a l n i v i v a s ?

Li ne ridas al mi; li trovas nenion komikan en mia konduto, aŭ almenaŭ ne montras tion. Li staras longe kaj serioze pripensas. Kaj poste li diras:

—Ĉu vi, sinjoro, bonvolus afable turni vin al la direkcio. Duona etaĝo maldekstren, bonvolu!



Kaj li malaperas kun subita ĉapsaluto.

Mi restas staranta korporema kaj senhelpa. Li pravas. Al la direkcio mi devas turni min. Estas klare. Ordinara, sensignifa pordisto ne ŝuldas scii pri tio. Kaj estas ridinde demandi ion tian de iu, kiu havas strion ĉirkaŭĉape, de subulo, de kompatinda pelata mizerulo, kiu ne havas tempon por pensi pri io.

Se mi nur estus kuraĝinta iri en la direktejon. Se mi nur estus kuraĝinta. Sed mi rigardas timeme al la eta pordo kun latuntabulo kaj obtuza vitro ĉe la pordosupro ĉiufoje, kiam mi devas preteriri tie, mi rapidas pretere nerveze. Ĉar mi ankoraŭ ne estas paginta por mia restado. Mi atendas monsendaĵon. Sed ĝi ne venas. Mi posedas nenion, sed mi atendas kaj atendas monon de certa loko, mi ne scias de kie. Ĝi venas neniam! Kaj dume kreskas kaj kreskas mia ŝuldo.

Mi ne kuraĝas eniri. Por nenio ajn mi kuraĝus eniri tien. Je Dio, estas terure, mi ne havas rajton restadi ĉi tie, eĉ ne ĉi tie, eĉ ne en tiu ĉi infero!

Mi ŝteliras supren en mian ĉambron. Mi rampas trans altaĵon de polvaj kaheloj, mi ĵetas min en la liton, kies fertrabetoj ĉizas mian dorson. Kaj mi cerbumas ĝis mi inertiginte falas en duondormon, en dormon.

Tie mi restas kuŝanta, malsana, senhelpa. Jaron post jaro. Mi ne plu havas forton ellitiĝi. La tempo kuregas

per furioza rapido. Ĉirkaŭ mi mi aŭdas la bruon; malkonstruon kaj rekonstruon. Mi cerbumas kaj cerbumas. Kial kaj kial? Mi estas alveninta tien ĉi kun la definitiva intenco kompreni, kio estas la senco de ĉio ĉi kaj kompreni, kio estas la senco pri mi mem. Mi cerbumas kaj cerbumas. Ĉirkaŭ mi martelado kaj bruoj, malkonstruado kaj rekonstruado. Mi serĉas la s e n c o n . Mi serĉas la s e n c o n ! Dio, se mi iam ekscios, kio estas la senco de tio tuta, certe mi adaptos min. Mi serĉas la s e n c o n !

Jaron post jaro. Jaron post jaro. Mi maljuniĝas, iĝas aĝa maljunulo kun taŭza, blanka hararo, miaj manoj estas sulkaj, miaj lipoj tremetas. Ĉirkaŭ mi oni najlas kaj bruas, krias kaj ofendaĉas. Estas ja diable klare, ke por ke oni pensu prudente kaj profunde, por ke oni atingu ian rezulton, oni devas havi almenaŭ iom da trankvilo kaj paco ĉirkaŭ si! Estas ja klare, ke por havi superrigardon pri la tuto, oni devus ne havi tian inferan malordon! La diablo prenu ĝin!

Mi aĝiĝas, aĝiĝas. Mi mortos, mi mortos certe!

Tiam mia malespero iĝas senlima, freneza. Mi ĵetas min en febro sur la liton, la fertrabetoj distranĉas mian korpon tiel ke ĝi sangas, kaj la sango gutas planken. Mi ĝemas kaj veas, mi krias laŭte pro la doloro.

La sencon! La sencon!

Ne, mi ne povas trovi ĝin! Mem mi ne povas trovi ĝin!

Eble mi devus sonorigi al la servistaro? Eble mi povus peti serviston iri al la kontoro kaj alporti informon? Mi volas diri, oni povus skribi ĝin sur paperon.

Ne, ne! Tiam oni sendos anstataŭe la fakturon. Kaj mi havas nenion per kio pagi, mi atendas leteron, mi atendas multe, multe da mono en letero, letero, kiu neniam venas. Mi atendas tion nepre, mi atendas ĝin el certa loko, mi scias, ke ĝi venos, tio povas esti ĉi tie kiam ajn. Sed ĝi venas neniam, venas neniam, ne, neniam en tiu ĉi vivo! Mi ne havas rajton esti ĉi tie, mi ne havas rajton kuŝi ĉi tie sur la lito, kiu vundas mian dorson.

Ĉiuj aliaj penegas kaj laboras. Mi, mi atendas leteron. Ĉiuj aliaj martelas, najlas, tapetigas, morteras, lakas. Mi, mi cerbumas, serĉas la sencon, la sencon mem en ĉio.

Eble mi devus sonorigi? Oni povus eble skribi tion sur paperon? Ne, ne! Pro tio oni ne povas sonorigi kaj ricevi tiel informon. Tion oni ne povas skribi sur paperslipon.

Ho, Dio en la ĉielo!

Nun mi sentas, ke la morto proksimiĝas! Jes! Mi mortos baldaŭ! Post tempeto mi mortos!

Ho, dio, ho dio ...!

Tiam mi ellitiĝas. Mi ŝanceliĝas ĉirkaŭe en la ĉambro. Mi ekprenas miajn vestojn. Estas kelkaj uzablaj ĉifonoj, kuŝantaj en angulo. Tremante pro la malvarmo mi surme-

tas ilin. Kaj mi ŝanceliĝas tra la pordo malsupren laŭ la ŝtupoj.

Mi ne havas kolumon. Mi devas teni la manon ĉekole. Oni ridas pri mi, oni mokas min, kraĉas post mi. Ape-naŭ mi rimarkas tion.

Fine mi staras ekster la pordo de la direkcio. Malklare mi videtas la latuntabulon kaj la obtuzan vitron en la pordosupro, ĉe kies interno granda ombro movas sin. Mi frostotremas.

Mi faras kelke da profundaj spiroj. Mi provas min iom koncentri. Mi kuntiras la vestojn iom pli. Fine mi malfermas kaj enpaŝas.

Post brilpolurita jugland-tablo staras sinjoro en bonfasonita ĵaketo kaj stria pantalono, blua sigelringo sur la montrofigro kaj nazumo, kies supra rando estas rekta kiel linio. Li estas mem la ĉefdiablo. Li kaptas min per subita rigardo.

Mia mano estas ĉe la kolo. Mi trakombas la taŭzan hararon per la fingroj. Mi provas esti trankvila, tute trankvila.

Kaj mi iras al la tablo, apogas min tie per ambaŭ manoj kaj klinas min iomete al li.

—Pardonu — mi diras ... Pardonu, eble vi volus diri al mi ... kial mi vivis?

Mi diras tion rapsode, kun klakantaj dentoj, tremante en la tuta korpo.

Ankaŭ li venas antaŭen al la tablo. Li apogas la manojn ĉe ĝi, tute kiel mi, kaj tamen alimaniere, ŝajnas al mi. Li klinas sin al mi, li havas bluan kravaton kun kravatbroĉo kaj agrablan spirodoron. Li diras:

—Vi, sinjoro? Persone vi?

Mi kapmovas jesante.

Tiam li malfermas grandan libron kaj rigardas ĝin. Li trovas min. Kaj nun li sekvas per la montrofigro paĝon post paĝo desupre malsupren, brilajn paĝojn kun tri ruĝaj kolonoj dekstre.

Estas turmente. Estas terure.

Tiam li refrapas la libron tondre kaj akre alrigardas min:

—Tion ja eĉ la diablo ne scias. Eĉ ne la diablo!

Li ne diras ion pli. Li ne riproĉas min pro io. Li eĉ ne plu rigardas min, sed trankvile reiras al sia laboro.

La afero ŝajne ne plu interesas lin. Ĝi tute ne interesas lin.

Mi kuntiriĝas, neniĝas. Mi balbutas kelkajn vortojn, li ne aŭdas ilin. Mi traboras la harojn per miaj fingroj, ili estas malsekaj kiel tiuj de infano. Kaj mi ŝanceliĝas al la pordo.

Mi iras malsupren laŭ la ŝtupoj, mi iras tra la vasta halo. Mi grimpas inter bretaltaĵoj, konstrustabloj, barbaj laboristoj. Sed neniu plu ĵetas aĉajn admonojn post min,

neniu superŝutas min per blasfemoj, neniu puŝas min, neniu instrukcias min. Mi interesas plu neniun.

Mi tute ne interesas ilin.

Mi estas mortinta.

Nevidate mi iras tra la grandaj pordoj, larĝe malfermitaj.

Kaj mi migras for en la senfunda nigro, de kie mi estas veninta.

**Pär Lagerkvist**

*El la sveda tradukis Ferenc Szilágyi*

[www.omnibus.se/inko](http://www.omnibus.se/inko)

**ISBN 91-7303-176-3**